

eLIBRO

Selma Lagerlöf

La junulino el Stormyr



INKO

Selma Lagerlöf

LA JUNULINO EL STORMYR

El la sveda tradukis

Oskar Frode

Lingve redaktis

Franko Luin

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-069-4

inko@omnibus.se

http://www.omnibus.se/inko

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

DECEMBRO 2000

i

Estas juĝa kunsideo en la kamparo. Ĉe la juĝista tablo en la fundo de la ĉambrego sidas maljuna kampara juĝisto, alta kaj solidkreska viro kun larĝa kaj maldelikata vizaĝo. Dum multaj horoj li jam juĝis unu proceson post la alia kaj fine iom da tedego kaj malgajo ekposedis lin. Estas malfacile scii, ĉu la varmego kaj la sufokeco en la ĉambrego lin turmentas aŭ ĉu li tediĝas pro ĉiuj bagatelaj kvereloj, kiuj ŝajnas esti okazigataj pro neniuj alia kaŭzo ol por evidente pruvi la disputemecon, la senkompatecon kaj la profitecon de la homoj. Li ĵus komencis unu el la lastaj procesoj prijuĝotaj tiun tagon. Temas pri postulo de monkontribuo al edukado.

Ĉi tiun aferon oni jam pritraktis kelkajn fojojn antaŭe, kaj la protokolo de la antaŭaj kunsidoj estas laŭlegata. El ĝi oni ekscias unuavice, ke la plendantino estas malriĉa farmeta filino kaj ke la akuzito estas edziĝinta viro.

Plue la protokolo tekstas, ke la akuzito deklaris, ke la plendantino lin malprave denunciis kaj nur pro profitemo. Li konfesas, ke la plendantino ja servis dum kelka tempo en lia domo, sed dum tiu tempo li ne ame proksimigis ŝin, kaj ŝi havas neniun rajton postuli ian ajn helpon de li. La plendantino tamen persistis en sia postulo, kaj post kiam oni aŭskultis kelkaj atestantoj, la akuzito estas devigota defendi sin per ĵuro, se li ne volas esti verdiktita liveri apogon al la plendantino. Ambaŭ partioj ĉeestas kaj staras unu apud la alia antaŭ

la juĝista tablo. La plendantino estas tre juna kaj aspektas tute timigita. Ŝi ploras pro timemo kaj pene forviŝas la larmojn per faldita naztuko, kiun ŝajne ŝi ne scias malfaldi. Ŝi portas iom novajn kaj neuzitajn nigrajn vestojn, sed ili harmonias al ŝi tiel malbone, ke oni emas opinii, ke ŝi prunteprenis ilin por povi aperi bonmore antaŭ la juĝistaro. Koncerne la akuziton oni tuj konstatas, vidante lin, ke li estas viro riĉeta. Li estas kvardekjarulo kaj aspektas brava kaj vigla. Nun tie antaŭ la juĝisto li havas tre bonan sintenon. Oni vidas, ke ne plaĉas al li stari tie, tamen li neniel aspektas ĝenata.

Tuj kiam la protokolo estas laŭtleĝita, la juĝisto sin turnas al la akuzito kaj demandas al li, ĉu li persistas en sia malkonsento kaj ĉu li estas preta fari la ĵuron. Responde al tiuj demandoj la akuzito diras rapidan "jes." Li komencas traserĉi la veŝtpoŝon kaj prezentas pastran ateston, kiu tekstas, ke li konas la gravecon kaj sencon de ĵuro kaj por ĝin fari ne estas al li malhelpaĵo.

Dume la plendantino daŭre ploras. Ŝajnas ke ŝi estas nenvenkeble timema kaj obstine ŝi tenas la okulojn mallevitaj. Ŝi ankoraŭ ne levis la rigardon tiom, ke ŝi povis vidi la akuziton vizaĝen.

Sed kiam li diras sian "jes," ŝi ektemas. Ŝi proksimiĝas al la tablo je kelkaj paŝoj, kiel se ŝi volus ion kontraŭudiri, sed tiam ŝi haltas. "Tio tamen estas neebbla," ŝi ŝajnas diri al si mem. "Li verŝajne ne diris jes. Mi certe misaŭdis."

Tamen la juĝisto akceptas la ateston, kaj samtempe li signe avertas la pedelon kaj la pedelo alpaŝas la tablon por meti la biblion antaŭ la akuziton.

La plendantino aŭdas, ke iu preterpasas ŝin kaj maltrankviliĝas. Ŝi devigas sin suprenlevi la rigardon tiom, ke ŝi povas

vidi super la tablon, kaj tiam ŝi vidas, kiel la pedelo ŝovas la biblion.

Denove ŝajnas, kiel se ŝi volus kontraŭdiri. Sed ŝi denove haltas. Estas ja neeble, ke li rajtos fari la ĵuron. La juĝisto devas lin deteni. La juĝisto estas prudenta viro, kaj li bone scias, kion pensas kaj opinias la homoj en ŝia hejma regiono. Li bone scias, kiel severaj estas ĉiuj homoj, tuj kiam okazis io, kio koncernas la edzecon. Ili ne konas pli malmoralan pekon ol tiu, kiun ŝi faris. Kial ŝi konfesus ion tiaspecan pri si mem, se tio ne estus vera? La juĝisto ja devas kompreni, kian teruran malestimon ŝi jam altiris al si. Kaj ne nur malestimon, sed ĉian eblan mizeron. Neniu volas dungi ŝin kiel servantion, neniu volas havi ŝian laboron. Ŝiaj propraj gepatroj apenaŭ toleras ŝin en sia dometo kaj ĉiutage ili priparolas ŝian forpelson. Ne, la juĝisto devas scii, ke ŝi ne estus postulinta de edziĝinta viro subtenon, se ŝi ne rajtus tion fari.

La juĝisto ja ne povas kredi, ke ŝi mensogas pri tia afero, ke ŝi estus alvokinta tian teruran malfeliĉon sur sin, se ŝi povus iun alian denunci ol edziĝintan viron. Kaj tion sciante, li devas ja malhelpi la ĵuron.

Ŝi vidas, ke la juĝisto tralegas plurfoje la pastran ateston. Pro tio ŝi komencas kredi, ke li intencas interveni.

Estas vere ankaŭ, ke la juĝisto aspektas pripensema. Li turnas siajn rigardojn kelkfoje al la plendantino. Sed farante tion, la esprimo de tediĝo kaj abomeno, kiu posedas lian vizaĝon, fariĝas eĉ pli videbla. Ŝajnas kiel se li kolerus al ŝi. Eĉ se la plendantino diras la veron, ŝi ja estas malmorala homo, kaj la juĝisto povas neniel kompati ŝin.

Okazas kelkfoje, ke juĝisto intervenas en proceso, kiel bona kaj prudenta konsilanto, kaj malhelpas la partiojn tute

ruinigi sin mem, sed ĉi tiun tagon li estas laca kaj tediĝanta, kaj li ne pensas alion ol havigi al la leĝa procedo la kutiman ordon.

Li formetas la ateston kaj diras per kelkaj vortoj al la akuzito, ke li esperas, ke li sufiĉe pripensis la danĝeron de falsa ĵuro. La akuzito lin aŭskultas kun la sama trankvilo, kiun li montris la tutan tempon, kaj li respondas respektplene kaj kun digno.

La plendantino aŭskultas tion kun ekstrema timego. Ŝi faras kelkajn rapidajn gestojn kaj kunpremas la manojn. Nun ŝi volas paroli antaŭ la juĝisto. Ŝi batalas terure kontraŭ sia timemo kaj la plorsingultoj, kiuj ŝin malhelpas paroli. La rezulto tamen estas, malgraŭ ĉio, ke ŝi ne povas eldiri aŭdeblan vorton.

Do la ĵuro okazos. Li rajtas ĝin fari. Neniu malhelpos lin forĵuri sian animon.

Ĝis nun ŝi ne povis kredi, ke oni permesos, ke tio okazu. Sed nun ŝi sentas la certecon, ke tio estos baldaŭa, ke tio okazos la sekvantan momenton. Terurego multe pli sufokanta ol io ajn alia, kion ŝi spertis antaŭe, ŝin kaptas. Ŝi ŝtoniĝas. Jam ŝi eĉ ne ploras plu. La okuloj restas senmovaj en ŝia kapo. Li do intencas altiri al si la eternan kondamnon.

Ŝi ja komprenas, ke li volas senkulpigi sin per ĵuro antaŭ sia edzino. Sed eĉ se ŝi lin kolerus, li tamen ne rajtas pro tio forĵeti la gracon de sia animo. Ekzistas nenio pli terura ol falsa ĵuro. Ekzistas io mistera kaj terura en tia peko. Ekzistas neniu pardono por ĝi. La pordegoj de la infero malfermiĝas propramove, kiam estas menciita la nomo de falsĵurinto.

Se nun ŝi estus levinta sian rigardon al lia vizaĝo, ŝi timus

vidi ĝin stampita per la marko de kondamno, surpremita de la kolero de Dio.

Dum ŝi pligrandigas al si sian teruregon, la juĝisto instruas al la akuzito, kiel li devas meti la fingrojn sur la biblion. Poste la juĝisto rigardas la protokolon por trovi la ĵurformulon.

Kiam ŝi vidas, ke li metas la fingrojn sur la libron, ŝi alproksimiĝas je unu paŝo kaj ŝajnas, ke ŝi volas etendi sian brakon super la tablon kaj forpreni lian manon.

Sed ankoraŭ ŝin tamen detenas lasta espero. Ŝi kredas, ke li cedos nun, lastmomente.

La juĝisto jam trovis la pakon de la protokolo, kiun li serĉis, kaj li komencas antaŭlegi la ĵuron laŭte kaj klare. Tiam li paŭzas, por ke la akuzito ripetu liajn vortojn. Kaj la akuzito fakte komencas rediri ilin, sed li okaze eraras kaj la juĝisto devas rekomenci de la komenco. —

Nun ŝi ne povas havi plu eron da espero. Nun ŝi scias, ke li intencas ĵuri trompe, ke li intencas altiri al si la koleron de Dio por tiu ĉi vivo kaj ankaŭ por la estonta.

Tie ŝi staras premtordante la manojn, tute forlasita. Kaj estas ĉio pro ŝi, ĉar ŝi denunciis lin!

Sed ŝi ja estis senlabora, ŝi malsatis kaj malvarmis. La infano estis mortanta. Al kiu alia sin turni por havigi helpon?

Neniam ŝi kredus, ke li volus fari tian abomenindan pekon.

Nun la juĝisto denove antaŭlegas la ĵuron. Post kelkaj momentoj la afero estos farita. Tia afero, kiun oni ne povas malfari, kiun oni povos neniam forigi.

Ĝuste kiam la akuzito komencas rediri la ĵuron, ŝi alkuras, forpuŝas lian etenditan manon kaj tiras al si la biblion.

Ŝia grandega teruro fine donis al ŝi kuraĝon. Li ne rajtas forĵuri sian animon. Li ne rajtas fari tion.

La pedelo tuj alkuras por forpreni la biblion kaj admone trankviligi ĝin. Ŝi havas senliman timon pri ĉio, kio koncer- nas la juĝejon, kaj ŝi certe opinias, ke tio, kion ŝi ĵus faris, estos kaŭzo por meti ŝin en malliberejon. Sed ŝi ne forlasas la biblion. Kiom ajn kostos tio, li ne rajtu fari la ĵuron. Ankaŭ la ĵuronto alkuras por preni la libron, sed ŝi malcedas ankaŭ al li. "Vi ne rajtas ĵuri!" ŝi krias. "Vi ne rajtas."

Tio, kio okazas, kaŭzas kompreneble grandegan miron. La ĉeestantoj sin puŝas antaŭen al la tablo, la skabenaro komen- cas levi sin, kaj la sekretario leviĝas kun la inkujo en la mano, por ke ĝin oni ne renversu.

Tiam la juĝisto laŭte krias kun kolera voĉo: "Trankviliĝu!" Kaj ĉiuj senmoviĝas.

"Kion vi faras? Kiel vin koncernas la biblio?" demandas la juĝisto la plendantinon kun tiu sama akra kaj severa voĉo.

Post kiam ŝi malŝarĝis sian timon per malespera ago, ŝia angoro malpliĝis tiom, ke ŝi povas respondi: "Li ne rajtas fari la ĵuron!"

"Silentu! kaj remetiu la libron," ordonas la juĝisto.

Sed ŝi ne obeas, kaj firme tenas la libron per ambaŭ manoj. "Li ne faru la ĵuron," ŝi krias kun senbrida fortego.

"Ĉu vi tiel deziras gajni la proceson," demandas la juĝisto kun pli severa voĉo.

"Mi volas nuligi la proceson," ŝi krias laŭte kaj akre. "Mi ne volas devigi lin ĵuri."

"Kial vi kriegas?" demandas la juĝisto. "Ĉu vi perdis la pru- denton?"

Ŝi enspiregas pene kaj subite kaj klopodas trankviliĝi. Ŝi

aŭdas mem, kiel ŝi kriegas. La juĝisto certe devas kredi, ke ŝi perdis la prudenton, se ŝi ne povas diri trankvile, kion ŝi volas. Ŝi denove batalas kun si mem por kontroli la voĉon, kaj ĉi tiun fojon ŝi sukcesas. Malrapide, grave kaj klare ŝi diras, dum ŝi rigardas la juĝiston rekte vizaĝen: "Mi volas nuligi la proceson. Li estas la patro de la infano. Sed mi lin amas ankoraŭ. Mi ne volas, ke li ĵuru trompe."

Ŝi staras rekta kaj decidema meze antaŭ la tablo kaj daŭre rigardas la juĝiston en la maldelikatan vizaĝon. La juĝisto apogas ambaŭ manojn sur la tablodisko, kaj dum longa tempo li ne fortunigas la okulojn de ŝi. Dum la juĝisto rigardas ŝin, granda ŝanĝo okazas al li. Ĉio tediga kaj malkontenta, kion montris antaŭe liaj trajtoj, malaperas kaj la granda, maldelikata vizaĝo fariĝas bela pro la plej bela emocio. "Jen," pensas la juĝisto, "kia estas mia popolo. Mi ne ĉagreniĝos pri ŝi, ĉar ja ekzistas ĉe unu el la plej malgrandaj tiom da amo kaj pieco."

Subite la juĝisto sentas, ke liaj okuloj pleniĝas je larmoj, kaj tiam li ektemas preskaŭ hontema kaj ĵetas rapidan rigardon ĉirkaŭ si. En la sama momento li vidas, ke la sekretario kaj prokuroro kaj la tuta longa vico da skabenoj sin klinas antaŭen por rigardi la knabinon, kiu staras antaŭ la tablo kaj premas la biblion al si. Kaj li vidas brilon sur iliaj vizaĝoj, kiel se ili vidus ion tre belan, kio ilin ĝojigis ĝisfunde de ilia animo.

Tiam la juĝisto ankaŭ rigardis la ĉeestantojn, kaj ŝajnis al li, ke ĉiuj sidas trankvile, subite enspiregante, kiel se ili ĵus aŭdis, kion ili deziregis antaŭ ĉio.

Laste la juĝisto rigardas la akuziton. Nun li staras tie kun mallevita kapo kaj rigardas planken.

La juĝisto sin turnas denove aŭ la malriĉa knabino. "Mi respektas vian volon," li diris. "La proceso estu nuligita," li diras tuj poste al la sekretario.

La akuzito ektemas, kiel se li volus ion kontraŭdiri. "Kio nun estas?" la juĝisto kriegas al li. "Ĉu vi malinklinas al ĉi tio?" La akuzito, klinante la kapon, diras apenaŭ aŭdeble: "Ho ne, estas plej bone, ke fariĝu tiel."

La juĝisto restas trankvila ankoraŭ momenton, poste li ŝovas malantaŭen la pezan seĝon, leviĝas kaj iras ĉirkaŭ la tablo al la plendantino. "Dankon," li diras, etendante al ŝi la manon.

Ŝi ĵus formetis la biblion, ploras kaj forviŝas la larmojn per la faldita naztuko.

"Mi vin dankas," rediras la juĝisto, prenas ŝian manon kaj ĝin skuas, kiel se ŝi apartenus al vera bravulo.

ii

Neniu kredu, ke la junulino mem, kiu ĵus travivis tiel penigan momenton tie ĉe la tablo, opinias, ke ŝi faris ion laŭdindan. Kontraŭe ŝi opinias, ke ŝi hontigis sin antaŭ la tuta ĉeestantaro. Ŝi ne komprenas, ke estas io honora en tio, ke la juĝisto iris al ŝi por premi al ŝi la manon. Ŝi kredas, ke tio nur signifas, ke la proceso jam finiĝis, kaj ke oni permesas al ŝi foriri.

Ŝi eĉ ne vidis, ke la homoj ŝin rigardas afable, kaj ke ekzistas multaj, kiuj volus premi ŝian manon. Ŝi nur elŝteliĝis kaj deziris forkuri. Sed estis kunpuŝiĝo ĉe la pordo. La kunsidon oni finis kaj multaj kuregis al la pordo por elveni plejble rapide. Ŝi fortiriĝis, kaj ŝi verŝajne forlasos la kunsidejon nur post la aliaj. Ŝi opiniis, ke ĉiuj aliaj devas eliri antaŭ ŝi.

Kiam ŝi fine elvenis, la ĉareto de Gudmund Erlandsson staris ĉevaligita antaŭ la ŝtuparo. Gudmund sidis en la ĉareto kun la bridoj en la manoj kaj li ŝajnis atendi iun. Tuj kiam li vidis ŝin inter la homoj amase elirantaj el la kunsidejo, li kriis al ŝi: "Venu ĉi tien, Helga! Vi povas veturi kun mi, ĉar ni havas la saman vojon."

Kvankam ŝi aŭdis sian nomon, ŝi ne povis kredi, ke oni vokas ŝin. Ne estas eble, ke Gudmund Erlandsson volas ŝin veturigi. Li estis la plej bela viro de la tuta paroĥo. Juna kaj bela, de bona familio kaj la favorato de ĉiuj homoj. Fakte ŝi ne povis kredi, ke li volus interrilati kun ŝi.

Kun kaptuko tute ŝovita antaŭen super la frunto ŝi preterrapidis lin kaj nek rigardis supren, nek respondis. "Ĉu vi ne aŭdas, Helga, ke vi povas veturi kun mi?" Gudmund diris kaj estis en lia voĉo vere afabla esprimo. Sed ŝi povis neniel enigi en sian kapon, ke Gudmund bonvolas al ŝi. Ŝi kredis, ke li volos iamaniere moki ŝin, kaj ŝi nur atendis, ke tiuj, kiuj troviĝas apude, komencos rideti kaj ridegi. Ŝi rigardis lin time-me kaj indigne, kaj preskaŭ duonkuris de la kunsido por ne aŭdi la komencotan ridegon.

Gudmund estis fraŭlo tiutempe kaj loĝis en la domo de siaj gepatroj. La patro estis bienulo. Li ne havis grandan bienon kaj li ne estis riĉa, sed li havis la porvivon. La filo veturis al la kunsido por havigi al la patro kelkajn aktojn, sed ĉar lia veturo havis ankaŭ alian celon, li pretigis sin bonege. Li prenis la novan ĉareton, kies lako havis eĉ ne fendeton; la ĉevalon li striglis, ĝis kiam ĝi brilis kiel silko, kaj la jungaĵon li ciris. Li metis beletan, ruĝan lankovrilon apud sin sur la sidejon, kaj sin mem li vestis per mallonga ĉasjaketo, malgranda griza feltoĉapelo kaj altaj botoj, en kiujn estis enŝovita la pantalone. Ne estis tio festotaga kostumo, sed li bone sciis, ke li aspektas vira kaj impona en ĝi.

Gudmund sidis sola en la ĉareto, kiam matene li forveturis de sia hejmo, sed li pripensis agrablajn aferojn kaj la tempo ne ŝajnis al li longa. Veturinte preskaŭ duonvoje, li preterpasis malriĉan, tre malrapide irantan junulinon, kiu aspektis kiel se ŝi ne kapablu levi la piedojn pro laciĝo. Estis aŭtuno, la vojo estis tute malseka pro pluvo kaj Gudmund vidis, kiel profunde ŝi eniĝas en la koton je ĉiu paŝo. Li haltis kaj demandis, kien ŝi iras, kaj eksciante, ke ŝi intencas iri al la juĝa kunsido, li proponis al ŝi veturi kun li. Ŝi dankis, supren-

rampis la ĉareton malantaŭe kaj sidiĝis sur la mallarĝan tabulon, kie estis ligita la fojnosako, kiel se ŝi ne kuraĝus tuŝi la ruĝan felton apud Gudmund. Li eĉ ne pensis permesi, ke ŝi sidiĝu apud lin. Li ne sciis, kiu ŝi estas, sed li supozis, ke ŝi estas filino de iu malriĉa kamparano kaj li pensis, ke certe ŝi ŝatos veturi malantaŭe en la ĉareto.

Kiam ili atingis deklivon kaj la ĉevalo iris malpli rapide, Gudmund ekbabilis. Li volis informiĝi pri ŝiaj nomo kaj loĝloko. Aŭdinte, ke ŝi nomiĝas Helga kaj loĝas en arbara farmeto nomata Stormyr, li komencis maltrankviliĝi. "Ĉu vi ĉiam restis en tiu farmeto ĉe viaj gepatroj aŭ ĉu vi forestis kiel servistino?" li demandis. La lastan jaron ŝi loĝis hejme, li eksciis, sed antaŭe ŝi tenis servon. "Ĉe kiu do," rapidege demandis Gudmund. Ŝajnis al li, ke iom da tempo pasis antaŭ ol ŝi respondis. "En Vestgård ĉe Per Mårtensson," ŝi diris fine, mal-laŭtigante la voĉon, kiel se ŝi estus preferinta, ke li tion ne aŭdu. Sed Gudmund certe aŭdis tion. "Ho, tiam estas vi, kiu — —," li diris, sed li ne daŭrigis la frazon. Li forturnis sin de ŝi kaj sidiĝis laŭkutime kaj ne diris plu vorton al ŝi. Gudmund donis al la ĉevalo baton post bato, laŭte blasfemis pro la malbona vojstato kaj ŝajnis esti tre malbonhumora. La junulino restis senmova dum kelka tempo, sed baldaŭ Gudmund sentis ŝian manon sur sia brako. "Kion vi deziras?" li demandis sen turni la kapon. Li haltu, li eksciis, por ke ŝi povu eliri. "Ha, kial?" Gudmund diris insultvoĉe. "Ĉu vi ne bone veturas?" — "Jes, dankon, sed mi preferas piediri." Gudmund batalis iom kun si mem. Estis bedaŭrinde, ke ĝuste ĉi tiun tagon li invitis tian, kia estas Helga, veturi kun li. Sed li ankaŭ pensis ke, permesinte al ŝi suriri la ĉareton, li ne povis forpeli ŝin. "Haltu, Gudmund, mi petas," rediris la junulino. Ŝi parolis tute de-

cideme, Gudmund streĉis la bridojn. — ”Estas ja ŝi, kiu deziras elveturiĝi,” li pensis. ”Mi ne bezonas devigi ŝin veturi kontraŭvole.” Jen ŝi staris sur la vojo, antaŭ ol la ĉevalo haltis. — ”Mi kredis, ke vi min rekonis, kiam vi proponis al mi kunveturi,” ŝi diris. ”Alie mi ne estus suririnta la ĉareton.” Gudmund diris mallongan ”adiaŭ” kaj denove forveturis. Ŝi certe estis prava, kredante, ke li rekonis ŝin. Li ja multajn fojojn jam vidis la junulinon de la farmeto de Stormyr kiel infanon, sed ŝi ŝangiĝis, post kiam ŝi fariĝis plenkreska. Komence li tre ĝojis, ke li liberigis sin de la kunveturantino, sed iom post iom li sentis malkontenton pri si mem. Verŝajne li ne povis agi alie, sed ne plaĉis al li esti kruela al iu ajn.

Momenton post kiam Gudmund forlasis Helgan, li flankeniĝis for de la ŝoseo, veturis laŭ mallarĝa vojo kaj atingis grandan, bonegan bienon. Kiam Gudmund haltis antaŭ la ŝtuparo, la enirpordo malfermiĝis kaj unu el la filinoj montris sin sur la sojlo. Gudmund salute demetis la ĉapelon, kaj en la sama momento lia vizaĝo iomete ruĝiĝis. ”Mi dezirus scii, ĉu la skabeno estas hejme?” li diris. — ”Ne, paĉjo jam forveturis al la kunsido,” respondis la filino. — ”Vere, li jam forveturis!” diris Gudmund. ”Mi veturis ĉi tien por demandi, ĉu lia skabena moŝto volus veturi kun mi. Mi ankaŭ intencas veturi al la kunsido.” — ”Paĉjo ĉiam tiel fruas,” plendis la filino. — ”Tio ne gravas,” diris Gudmund. — ”Paĉjo certe deziregus veturi post tiel bonega ĉevalo kaj en tia bela ĉareto, kian vi havas, Gudmund,” afable diris la junulino. Gudmund iom rideitis, aŭdante la laŭdon. ”Nu, do mi devas forveturi denove,” li diris. — ”Ĉu vi ne volas eniri, Gudmund?” — ”Mi vin dankas, Hildur, sed mi ja devas veturi al la kunsido. Ne decas, ke mi malfru.”

Gudmund nun veturis rekte al la kunsidejo. Li estis tre kontenta, kaj ne plu pensis pri la renkonto kun Helga. Estis feliĉe, ke ĝuste Hildur eliris sur la ŝtuparon, por ke ŝi vidu kaj la ĉareton kun la felto, kaj la ĉevalon kun la jungaĵo. Ŝi certe ĉion rimarkis.

Por la unua fojo Gudmund ĉeestis kunsidon, Ŝajnis al li, ke li aŭdas kaj ekscias tie multon interesan, kaj li restis tie la tutan tagon. Li sidis en la kunsideja ĉambro, kiam oni pritraktis la aferon de Helga, li vidis kiel ŝi tiris al si la biblion kaj firme eltenis la pedelon kaj la juĝiston. Kiam ĉio finiĝis kaj la juĝisto jam premis la manon al Helga, Gudmund subite leviĝis kaj eliris. Li rapide jungis la ĉevalon al la ĉareto kaj veturis antaŭ la ŝtuparon. Li opiniis, ke Helga kondukis kuraĝe, kaj nun li intencis honori ŝin. Sed ŝi estis tiel timigita, ke ŝi ne komprenis la intencon, sed forŝteliĝis de la honoro, kiun li jam planis por ŝi.

Tiun saman tagon, malfrue vespere, Gudmund alvenis al Stormyr. Stormyr estis farmeto sur deklivo de arbara altaĵo, kiu ĉirkaŭis la paroĥon. La tien kondukanta vojo estis ĉevalo veturebla nur vintre, kiam neĝo ĉion kovris, kaj Gudmund estis devigata tien piediri. Estis malfacile malgraŭ tio antaŭeniri. Li preskaŭ rompis la krurojn pro ŝtonoj kaj trunkoj, kaj estis necese transvadi riveretojn, kiuj transfluis la vojon en multaj lokoj. Se ne estus klarega lunbrilo, li ne trovus la vojon al la farmeto, kaj li pripensis la penigan vojon, kiun Helga devis iri tiun saman tagon.

La farmeto de Stormyr kuŝis sur kulturejo, proksimume mezvoje sur la altaĵa deklivo. Gudmund ne estis tie antaŭe, sed ofte li vidis la lokon de malsupre de la valo, kaj li ĝin konis tiom, ke li sciis, ke li ne eraras.

Ĉirkaŭ la kulturejo troviĝis tre densa kaj malfacile transgrimpebla plektobarilo. Ĝi verŝajne estis kvazaŭ ŝirmilo kaj defendo de la sovaĝejo, kiu ĉirkaŭis la farmeton. La dometo kuŝis ĉe la supra rando de la ĉirkaŭfermita kulturejo. Antaŭ ĝi etendiĝis dekliva herboriĉa korto kaj malsupre de la korto troviĝis kelkaj grizaj mastrumaj konstruaĵoj kaj provizejo kun verda torfotegmento. Malgranda kaj malriĉa farmeto ĝi estis, sed estis nepridiskuteble, ke ĝi estis belege lokita tie supre. La marĉo, laŭ kiu estis nomita la farmeto, troviĝis ie apude kaj suprensendis nebulon, kiu etendiĝis bele kaj brilis kiel arĝento pro la lunbrilo kaj formis kronon ĉirkaŭ la altaĵo. La supro de la monto ankoraŭ elstaris super la nebulo, kaj la dorso, kiu estis pinta pro abioj, desegniĝis kontraŭ la ĉielo. Malsupre super la valo la lunbrilo estis tiel klara, ke oni povis distingi kaj la kampojn kun la farmoj kaj la serpentumantan rivereton, super kiu glitflugis la nebulo kiel plej malpeza fumo. Ne estis malproksime tien, sed plej kurioze estis, ke la valo aspektis kiel stranga mondo, kie la aparteno al la arbaro ŝajnis havi neniun vivrajton. Ŝajnis ke la homoj, kiuj loĝas ĉi tie en la arbara farmeto, devus ĉiam resti sub la arboj. Verŝajne ili sentus sin komfortaj sube en la valo ne pli ol urogaloj, gufoj, linkoj, vakcinioj kaj trientaloj.

Gudmund transiris la senarban, herboriĉan lokon al la dometo. Fajrobrilo estis videbla tra la fenestro, nenio kovris la vitrojn, kaj li rigardis por vidi, ĉu Helga estas en la dometo. Lampeto brulis sur tablo ĉe la fenestro, kaj tie sidis la famliestro, riparanta malnovajn ŝuojn. La mastrino sidis pli malantaŭe en la ĉambro ĉe forno, kie brilis fajreto. Antaŭ ŝi troviĝis radŝpinilo, sed ŝi jam ĉesis sian laboron por ludi kun infaneto. Ŝi estis ĝin suprenlevinta en lulilo, kaj eĉ Gudmund

aŭdis, kiel ŝi babilas kun ĝi. Ŝia vizaĝo estis tre sulka kaj ŝi aspektis severa, sed klinante la kapon super la infaneton, ŝi fariĝis milda kaj ridetis al ĝi same ameme kiel estus farinta ĝia propra patrino.

Gudmund serĉis Helgan, sed li ne povis vidi ŝin en iu angulo de la ĉambro. Li tiam ekopiniis, ke estus plej bone resti ekstere, ĝis kiam ŝi alvenos. Li miris pri tio, ke ŝi ne ankoraŭ alvenis hejmen. Ĉu ŝi eble, reirante, gastis ĉe konatulo por ripozi kaj manĝi? Sed en ĉiu kazo ŝi devos alveni baldaŭ, se ŝi volas esti sub tegmento antaŭ ol venos nokto.

Gudmund restis dum momento silenta meze de la korto, atente aŭskultante paŝojn. Estis tute senbrue. Neniu vento moviĝis. Ŝajnis al li, ke li antaŭe ne rimarkis tian trankvilecon. Estis kiel se la tuta arbaro senspire atendis ion strangan. —

Neniu iris en la arbaro. Neniu branĉo rompiĝis kaj neniu ŝtono ruliĝis. Helga verŝajne longe ne alvenos. "Mi volus scii, kion ŝi diros, vidante min ĉi tie," Gudmund pensis. "Ŝi eble forkuros kriegante en la arbaron kaj ne kuraĝos reveni hejmen dum la tuta nokto."

Samtempe li pensis, ke estas tre strange, ke li nun subite tiom okupiĝas pri tiu farmeta junulino.

Kiam li alvenis hejmen de la kunsido, li iris laŭkutime al sia patrino por rakonti al ŝi ĉion, kion li travivis dumtage. La patrino de Gudmund estis saĝa kaj grandanima, kaj ŝi ĉiam sciis konduti tiel al la filo, ke ankoraŭ li fidis je ŝi same, kiel li faris kiel infano. Ŝi estis malsana de multaj jaroj; ŝi ne povis piediri, sed dum la tuta tago ŝi sidis senmove sur sia seĝo. Ŝi ĉiam ĝojis, kiam Gudmund revenis hejmen kaj alportis novaĵojn al ŝi.

Kiam Gudmund finis la rakonton pri Helga el Stormyr, li

vidis, ke la patrino fariĝis pensema. Longan tempon ŝi restis silenta, rigardante rekte antaŭ si. — "Ŝajnas tamen, ke troviĝas io bona en tiu junulino," ŝi diris poste. "Ne taŭgas forpeli iun, ĉar okazis al tiu foje io malagrable. Verŝajne estas tiel, ke ŝi fariĝos dankema al tiu, kiu nun helpos ŝin." —

Gudmund tuj komprenis, pri kio pensas la patrino. Ŝi ne povis plu helpi sin mem, sed ĉiam bezonis ĉirkaŭ si iun por servi ŝin. Sed estis ĉiam malfacile trovi iun, kiu volas resti apud ŝi longe. La patrino multon postulis kaj ne estis facile kontentigebla, kaj krom tio la junulinoj preferis alian laboron, dum kiu ili havos pli da libertempo. Nun la patrino verŝajne pensis, ke ŝi dungos Helgan el Stormyr kaj Gudmund opiniis, ke tio estas tre bona propono. Helga certe fariĝos tre sindona al lia patrino. Ili en tiu kazo havus servistinon por longa tempo.

"Plej malfacile estos scii, kion fari kun la infano," diris la patrino post momento, kaj Gudmund komprenis, ke ŝi pri-pensas la aferon serioze. — "La geavoj sendube zorgos pri ĝi, ĉu ne?" diris Gudmund. — "Ne estas dirite per tio, ke ŝi volos disiĝi de la infano." — "Tamen necesos, ke ŝi ne agu plu laŭ propra volo. Ŝajnis al mi, ke ŝi aspektas malsata. Ili verŝajne ne multon manĝas tie supre en la farmeto."

Al tio la patrino nenion respondis, sed komencis paroli pri aliaj aferoj. Oni rimarkis, ke novaj duboj prezentis sin, kiuj malhelpis ŝian decidon.

Gudmund nun komencis rakonti, kiel li trovis pretekston por viziti la bienon de la skabeno de Elvåkra, kaj ke li renkontis Hildur. Li rakontis, kion ŝi diris pri la ĉevalo kaj la ĉareto, kaj estis facile videble, ke li ĝojas pro la renkonto. Ankaŭ la patrino estis tre kontenta. Sidante tie senmova en la ĉambro,

ŝi konstante planis la estontecon de sia filo, kaj ŝi unua proponis, ke li provu havigi la belan filinon de la skabeno kiel edzinon. Ŝi estis la plejeble oportuna. La skabeno estis vere respektinda kamparano. Li posedis la plej grandan bienon de la paroĥo, kaj multe da potenco kaj mono li havis. Estis fakte absurde esperi, ke li kontentiĝos je bofilo, kiu ne havas pli da riĉaĵo ol Gudmund, sed estis ankaŭ eble, ke li adaptiĝos al tio, kion deziras lia filino. Kaj ke Gudmund sukcesos havigi Hildur, se li volos, pri tio la patrino estis sufiĉe certa.

Estis la unua fojo, ke Gudmund komprenigis al la patrino, ke tiu opinio enradikiĝis en li, kaj ili nun longe parolis pri Hildur kaj pri ĉiuj riĉaĵoj kaj profitaĵoj, kiujn dote ricevos tiu, kiu havigos ŝin. Sed baldaŭ la interparolo ĉesis pro tio, ke la patrino jam denove meditis. "Ĉu vi povus venigi Helgan? Mi ja volas vidi ŝin, antaŭ ol mi dungas ŝin," ŝi diris fine. — "Estas bone, ke vi bonvolas zorgi pri ŝi, patrino," diris Gudmund, pensante por si mem, ke se la patrino ricevos flegistinon, je kiu ŝi kontentiĝos, lia edzino vivos pli agrable en lia gepatra hejmo. — "Vi vidos, ke la junulino plaĉos al vi," li daŭrigis. — "Estas ja ankaŭ bona ago zorgi pri ŝi," diris la patrino.

Kiam komenciĝis la krepusko, la malsanulino enlitiĝis kaj Gudmund eniris la stalon por strigli la ĉevalojn. Estis bela vetero, klara aero, kaj la tutan najbaraĵon heligis lunbrilo. Li pensis, ke li devas iri al Stormyr por konigi, eĉ la saman vesperon, la saluton de la patrino. Se la sekvonta tago estos senpluva, oni havos tiom da laboro por hejmenporti la avenon, ke nek li, nek iu alia havos tempon iri tien.

Kiam nun Gudmund staris antaŭ la farmeto de Stormyr kaj aŭskultis, li tamen aŭdis ne piedpaŝojn sed aliajn sonojn, kiuj je mallongaj paŭzoj akre trapenetris la silenton. Estis mallaŭ-

ta plendo, tre mallaŭta kaj sufokita ĝemado kaj kelkfoje plorsingulto. Ŝajnis al Gudmund, ke la sonoj venas el la ekonomia konstruaĵo, kaj li iris al ĝi. Kiam li proksimiĝis al ĝi, la ĝemoj ĉesis, sed estis evidente, ke iu moviĝas en la brullignejo. Gudmund tuj komprenis, kiu estas tie. "Ĉu vi sidas tie, Helga, kaj ploras?" Gudmund diris kaj stariĝis en la pordo, por ke la junulino ne forkuru, antaŭ ol li parolis kun ŝi.

Fariĝis denove tute silente. Gudmund estis certe prava, supozante ke Helga sidas tie plorante, sed ŝi klopodis sufoki la ĝemojn por ke Gudmund kredu, ke li aŭdis erare kaj foriru. Estis tute senlume en la budo kaj ŝi sciis, ke li ne povas vidi ŝin.

Sed tiun vesperon Helga sentis tian malesperon, ke ne estis facile al ŝi deteni la ploron. Ŝi ankoraŭ ne eniris la dometon por saluti la gepatrojn. Tion ŝi tute ne kuraĝis. Suprenirante dum la krepusko la penigajn deklivojn kaj pensante pri tio, ke nun estos necese rakonti al la gepatroj, ke ŝi ne ricevos monsubtenon de Per Mårtenson, ŝi tiel timis ĉion severan kaj kruelan, kion, laŭ ŝia opinio, diros al ŝi la gepatroj, ke ŝi ne kuraĝis eniri. Ŝi pensis, ke ŝi prefere restos ekstere, ĝis kiam ili enlitiĝos, ĉar tiamaniere ŝi nur la sekvontan matenon devos rakonti la malfeliĉon, kaj tial ŝi kaŝis sin en la lignejo. Dum ŝi sidis tie kaj sentis malvarmon kaj malsaton, eniris en ŝian animon la penso, kiel malfeliĉa kaj malestimata ŝi estas. Ĉiu honto kaj ĉiu timo, kiujn jam ŝi devis travivi, kaj ĉiu honto kaj ĉiu timo, kiujn ankoraŭ ŝi devos travivi, prezentis sin al ŝi kaj kuŝiĝis sur ŝin kun vera plumbopezo. Ŝi ploris pro si mem, pro tio, ke ŝi estas tiel malbona, ke neniu volas vidi ŝin. Ŝi memoris, ke iam, kiam ŝi estis infano, ŝi enfalis ŝlimtruon en la marĉo, kaj tuta ŝi eniĝis malsupren. Ju pli ŝi klopodis eliri, des

pli profunde ŝi eniĝis. Ĉiuj herbotufoj kaj ĉiuj arbetoj, kiujn ŝi kaptis, foriris. Same estis ankaŭ nun. Ĉio, kion ŝi penis kapti por resti sur la supro, perfide trompis ŝin. Neniu volis helpi ŝin. Tiun fojon, kiam ŝi falis en marĉon, fine alvenis paŝtisto, kiu ŝin elteris, sed nun neniu venis por savi ŝin. Nun ŝajnis al ŝi tute sendube, ke ŝi estas pereonta.

Pensante pri la marĉo, Helga tuj klare komprenis, ke por ŝi plej bone estus iri tien, suriri la ŝlimon por ke ĝi englutu kaj entombigu ŝin. Kiu estas tiel malbona, ke neniu volas rilati kun li, tiu certe ne povus fari ion pli bonan ol morti. Ankaŭ por la infano estus plej bone, se ŝi mortus, ĉar la patrino de Helga amas ĝin, kvankam ŝi tion ne volas montri, kiam Helga hejместas. Sed se Helga jam forestus por ĉiam, la avino zorgus pri la infaneto, kiel se ĝi estus ŝia propra.

Ŝi ne komprenis, ke meze en sia plej granda mizero ŝi jam faris ion, kio donis al la homoj pli bonajn pensojn pri ŝi. Ĉiun momenton ŝi fariĝis pli kaj pli konvinkita, ke la grandmarĉo estas por ŝi la sola ĝusta rifuĝejo. Kaj ju pli bone ŝi tion komprenis, des pli ŝi ploris.

Pro tio ne estis al ŝi facile deteni la ploron. Ne daŭris longe, antaŭ ol ŝi denove ekĝemis.

Gudmund konis nenion pli malagrablan ol virinan ploron. Li prefere estus tuj foririnta, sed li pensis, ke kaŭzinte al si la laboron supreniri al la farmeto, li ankaŭ devas plenumi la komision.

”Kio okazis?” li diris al Helga malmilde. ”Kial vi ne eniras?”

”Ho, mi ne kuraĝas,” Helga respondis, kaj ŝiaj dentoj klakis, dum ŝi parolis. ”Mi ne kuraĝas.”

”Kion vi timas? Vi ja kondukis tiel brave hodiaŭ antaŭ la pedeloj kaj juĝistoj. Vi ja ne timas viajn gepatrojn, ĉu?” —

”Jes, ili estas multe pli severaj ol ĉiuj aliaj.” — ”Kial ili koleru ĝuste hodiaŭ?” — ”Mi ja ne ricevos monon.” — ”Verŝajne vi estas tiel brava knabino, ke vi povos gajni la panon por vi mem kaj por la infano.”

Subite Helga pensis, ke la gepatroj eble aŭdas iliajn vortojn kaj eliros, demandante kiuj parolas. Kaj en tiu kazo ŝi devos rakonti al ili ĉion. Tiam ŝi ne povos forkuri kaj savi sin en la marĉo. Kaj en sia teruro ŝi salte leviĝis kaj volis forrapidi preter Gudmund. Sed li estis por ŝi tro rapida. Li kaptis ŝin je la brako kaj firme tenis ŝin. ”Ne! Vi ne forkuru, antaŭ ol mi estos parolinta kun vi.” — ”Lasu min iri, mi petas!” ŝi diris kaj furioze rigardis lin. — ”Ŝajnas, kiel se vi volus iri dronigi vin,” li diris, ĉar nun ŝi estis ekstere en la lunbrilo, kaj li povis vidi ŝian vizaĝon. — ”Nu, estas tute egale, se mi farus tion,” Helga diris, samtempe ĵetante la kapon malantaŭen kaj rigardante rekte en liajn okulojn. ”Hodiaŭ matene vi ja eĉ ne volis, ke mi sidu malantaŭe sur via ĉareto. Neniu volos rilati kun mi. Vi do devas kompreni, ke al tia malfeliĉulino, kiel mi, estas plej bone sin memmurdi.”

Gudmund ne sciis kion fari. Li deziris, ke li estu malproksime de tie, sed li ankaŭ opiniis, ke li ne forlasu homon en tia malespero. ”Aŭskultu min nun! Nur promesu, ke vi aŭskultos, kion mi volas diri al vi, kaj poste vi rajtos iri laŭplaĉe!” — Jes, tion ŝi promesis. — ”Ĉu oni povas sidiĝi tie ĉi?” — ”La hakŝtupo ja staras tie.” — ”Iru tien kaj sidiĝu kaj restu kvietaj!” — Ŝi sidiĝis tute obeeme. — ”Nun ne ploru plu!” li diris, ĉar ŝajnis al li, ke li komencis majstri ŝin. Sed plej bone estus, se tion li ne estus dirinta, ĉar ŝi tuj apogis la kapon en la manojn kaj ekploris pli senbride ol antaŭe.

”Ne ploru!” li diris eĉ preta piedbati la teron antaŭ ŝi. ”Cer-

te ekzistas homoj pli malfeliĉaj ol vi.” — ”Ne, neniu povas esti pli malfeliĉa!” — ”Vi tamen estas juna kaj forta. Vi nur sciuj, kiel fartas mia patrino. Ŝi tiel malsanas pro reŭmatismo, ke ŝi ne povas moviĝi, sed ŝi neniam plendas.” — ”Ŝi ne estas forlasita de ĉiuj, kiel mi.” — ”Vi ankaŭ ne estas forlasita. Mi jam parolis al patrino pri vi, kaj patrino min sendas tien ĉi al vi.” Ĉesis iom la plorĝemoj. Oni preskaŭ aŭdis la grandan silenton en la arbaro daŭre retenanta la spiron kaj atendanta ion strangan. ”Mia patrino komisiis min diri al vi, ke vi malsupreniru morgaŭ al ŝi, por ke ŝi rigardu vin. Mia patrino intencas demandi al vi, ĉu vi bonvolus servi ĉe ni.” — ”Ĉu vere?” — ”Jes, sed antaŭe ŝi volas vidi vin.” — ”Ĉu ŝi scias, ke ...” — ”Ŝi scias pri vi tiom, kiom ĉiuj aliaj.” —

La junulino salte leviĝis, kriante pro ĝojo kaj surprizo, kaj la postan momenton Gudmund sentis paron da brakoj ĉirkaŭ sia kolo. Li preskaŭ timiĝis, kaj lia unua penso estis forŝiri sin, sed poste li trankviliĝis kaj restis. Li komprenis, ke la junulino ne povas sin regi plu pro ĝojo, tiel ke ŝi ne scias, kion ŝi faras. En tiu momento ŝi estus ĵetinta sin al la kolo de la plej malbona trompanto nur por havi iom da simpatio en la granda feliĉo, kiu tamen okazis al ŝi.

”Ĉu ŝi volas dungi min? Tiam mi ja povas vivi!” ŝi diris, apogis sian kapon kontraŭ la bruston de Gudmund kaj denove ekploris, kvankam ne same senbride kiel antaŭe. ”Mi certigas al vi, ke mi estis serioza, dirante, ke mi intencas iri en la marĉon,” ŝi diris. ”Mi vin dankas pro via alveno! Vi savis mian vivon.” Ĝis nun Gudmund restis senmova, sed nun li sentis, ke io varma kaj kompatema moviĝis en li. Li levis la manon kaj karesis ŝian hararon. Tiam ŝi saltetis, kiel se li vekus ŝin el revo, kaj stariĝis tute rekta antaŭ li. ”Dankon pro via alveno!”

ŝi diris denove. Ŝi jam fariĝis terure ruĝa en la vizaĝo, kaj ankaŭ Gudmund ruĝiĝis.

”Nu, vi do venos morgaŭ al ni,” li diris kaj etendis la manon por adiaŭi. — ”Mi neniam forgesos, ke vi venis al mi hodiaŭ vespere,” Helga diris, kaj la granda dankemo superregis la embarason. — ”Nu, eble estis bone, ke mi venis,” li diris tute indifere, kvankam li sentis sufiĉan kontenton en si mem. ”Vi eniros nun, ĉu ne?” li diris. — ”Jes, nun mi certe eniros.”

Gudmund subite sentis sin same ĝoja pro Helga, kiel oni kutime fariĝas pro iu, kiun oni jam sukcesis helpi. Li postrestis kaj tute ne volis foriri. ”Mi preferus vidi vin sub la hejma tegmento, antaŭ ol mi foriras.” — ”Mi pensis, ke mi lasos ilin enlitiĝi, antaŭ ol mi eniras.” — ”Ne, vi tuj eniru, por ke vi havu iom da manĝaĵo kaj ripozo,” li diris, pensante, ke estas plezure zorgi pri ŝi.

Ŝi tuj iris al la dometo, kaj li akompanis ŝin tute kontenta kaj fiera, ke ŝi obeas lin. Kiam ŝi staris sur la sojlo, ili denove adiaŭis, sed antaŭ ol li faris kelkaj paŝoj, ŝi turniĝis kaj vokis lin. ”Restu ĉi tie antaŭ la domo, ĝis kiam mi enirisl Estas pli facile, se mi scias, ke vi staras tuj ekstere.” — ”Jes,” li diris, ”mi restos ĉi tie, ĝis la kriza momento forpasis.”

Tiam Helga malfermis la pordon kaj Gudmund rimarkis, ke ŝi lasis ĝin iomete malfermita. Kiel se estis, por ke ŝi ne sentu sin tute forlasita de la helponto, kiu staras ekstere. Li do ne skrupulis pri la aŭskultado kaj rimarkado de ĉio, kio okazis interne en la dometo. La maljunulino afable kapsalutis Helgan, kiam ŝi eniris. La patrino tuj demetis la infanon en la lulilon, poste ŝi alpaŝis al ŝranko kaj prenis tasegon da lakto kaj panon, kiujn ŝi metis sur la tablon. ”Jen! Sidiĝu nun kaj

manĝu!” ŝi diris. Poste ŝi iris al la forno, vigligante la fajron. ”Mi subtenis la fajron, por ke vi povu sekigi la vestojn kaj varmiĝi alveninte. Sed nun manĝu unue! Mangaĵon vi ja bezonas antaŭ ĉio, ĉu ne?” Helga dume daŭre restis ĉe la pordo. ”Vi ne devus akcepti min tiel afable, patrino,” ŝi diris mal-laŭte, ”Mi ne ricevos monon de Per. Mi rezignis la helpon.”

”Jam vizitis nin hodiaŭ vespere ĉeestinto de la kunsido, kiu aŭdis, kio okazis,” diris la patrino. ”Ni scias ĉion.”

Helga daŭre restis ĉe la pordo kaj atendis, kiel se ŝi ne sci-us, kion fari.

Tiam la farmisto formetis la laboraĵon, ŝovis la okulvitrojn supren sur la frunton kaj tusetis por fari paroladon, kiun li pripensis la tutan vesperon. ”La afero ja estas tia, Helga,” li diris, ”ke panjo kaj mi ĉiam penis esti honestaj kaj bonaj homoj, sed ni opiniis, ke ni senhonorigis pro vi. Estis, kiel se ni ne estus instruintaj al vi diferencigi malbonon de bono. Sed eksciante, kion vi faris hodiaŭ, ni diris al ni, panjo kaj mi, ke nun oni tamen povas vidi, ke vi ricevis bonan edukon kaj instruon, kaj ni jam pensis, ke eble ni povos ankoraŭ ĝojiĝi pro vi. Kaj panjo ne volis, ke ni enlitiĝu antaŭ ol vi revenas, por ke vi ricevu honoran bonvenigon.”

iii

Helga el Stormyr do venis al Närlunda, kaj tie ĉio bone prosperis. Ŝi estis laborema kaj inteligenta, kaj dankema por ĉiu afabla vorto, kiun oni diris al ŝi. Ŝi ĉiam sentis sin la plej malgrava, kaj neniam ŝi volis sin trudi al iu ajn. Ne daŭris longe, ĝis kiam la gemastroj kaj la kamaradoj estis kontentaj je ŝi.

La unuajn tagojn ŝajnis, ke Gudmund timas paroli al Helga. Li timis, ke la junulino el Stormyr eble faros al si imagojn pro tio, ke li iam helpis ŝin. Sed tio estis tute nebezonataj ĉagrenoj. Helga konsideris lin tro honesta kaj bona, por ke ŝi kuraĝu ampete levi al li siajn rigardojn. Gudmund tial baldaŭ rimarkis, ke ne estas necese al li distancigi ŝin. Ŝi lin timis pli ol iun alian.

Tiun saman aŭtunon, kiam Helga venis al Närlunda, Gudmund faris oftajn vizitojn ĉe la skabeno de Elvåkra, kaj oni multe parolis pri liaj bonaj ŝancoj fariĝi bofilo de la skabeno. Tamen, nur dum kristnasko li tute certiĝis, ke lia svatiĝo estas sukcesplena. Tiam venis al Närlunda la skabeno kune kun edzino kaj filino, kaj estis evidente, ke ili vojaĝis tien por vidi, kiel aspektos la vivo de Hildur, se ŝi edziniĝos kun Gudmund.

Por la unua fojo Helga vidis de proksime tiun, kun kiu Gudmund edziĝos. Hildur Erikdotter ankoraŭ ne estis dudekjara, sed estis certe strange, ke neniu povis vidi ŝin sen pensi, kia impona kaj bonega mastrino ŝi iam fariĝos. Ŝi estis altkreska, solide konstruita, blonda kaj beleta, kaj ŝajnis,

ke ŝi ŝatas havi multe da personoj ĉirkaŭ si por ilin prizorgi. Ŝi neniam estis timema aŭ embarasita, ŝi multe parolis kaj ŝajne sciis ĉion pli bone ol tiu, kun kiu ŝi parolis. Ŝi vizitis dum kelkaj jaroj urban lernejon kaj surhavis la plej belajn vestojn, kiujn Helga vidis ĝis tiam, sed ŝi ne aspektis vantema aŭ malmodesta. Konsiderante ŝiajn riĉecon kaj belecon, ŝi certe kiam ajn povus edziniĝi kun riĉa sinjoro, sed ŝi ĉiam diris, ke ŝi ne volas fariĝi nobela sinjorino kaj sidi senfara. Ŝi preferas edziniĝi kun kamparano kaj mastrumi kiel vera kamparano.

Helga opiniis, ke Hildur estas vere mirinda virino. Neniam antaŭe ŝi vidis homon kondukanta tiel bone. Neniam antaŭe ŝi estus kredinta, ke homo povus esti tiel perfekta laŭ ĉiuj vidpunktoj. Ŝajnis al ŝi granda feliĉo estonte servi al tia mastrino.

Ĉio bone prosperis dum la vizito de la skabeno, sed pense travivante tiun tagon, Helga spertis certan maltrankvilon. Jen la kaŭzo. Iom post la alveno de la gastoj, ŝi ĉirkaŭportis pleton por servi kafon. Kiam ŝi eniris kun la pleto, la edzino de la skabeno kliniĝis al la mastrino, demandante, ĉu tio estas la junulino el Stormyr. Ŝi tute ne mallaŭtigis la voĉon kaj Helga klare aŭdis la demandon. Sinjorino Ingeborg jesis, kaj tiam la alia diris ion, kion Helga ne povis aŭdi. Sed temis pri tio, ke laŭ ŝi estas strange, ke ili volas havi tian homon en la domo. Tio kaŭzis al Helga multe da malĝojo, sed ŝi penis konsoli sin per tio, ke la patrino ja diris la vortojn, ne Hildur.

Iun dimanĉon fruprintempe Helga kaj Gudmund okaze iris kune de la preĝejo. Marŝante malsupren de la preĝeja monteto, ili kuniris kun granda aro da aliaj ĉeestintoj je la diser-

vo, sed baldaŭ unu disiris post la alia, kaj fine kuniris nur Helga kaj Gudmund.

Gudmund tiam tuj pensis, ke de post tiu vespero ĉe la farmeto, li ne estis sola kun Helga, kaj la memoro pri tiu vespero nun forte reaperis al li. Dum la vintro li pensis sufiĉe ofte pri ilia unua renkontiĝo, kaj tiam li ĉiam sentis, kiel se io dolĉa kaj agrabla trapasas lian animon. Estante sola en la laboro li kutime vokis al sia penso la tutan belan nokton: la blankan nebulon, la helan lunbrilon, la nigran, arboriĉan altaĵon, la lumigitan valon kaj fine la junulinon, kiu ja ĉirkaŭbrakis lin je la kolo kaj ploris pro ĝojo. Ĉiun fojon, kiam ŝi eniris en lian memoron, la tuta okazintaĵo fariĝis pli bela. Sed kiam li vidis, kiel en lia hejmo Helga laboras kaj klopodas same kiel la aliaj, estis iom malfacile al Gudmund kredi, ke ĝuste ŝi partoprenis tion. Nun kiam li kuniris sola kun ŝi sur la vojo de la preĝejo, li ne povis ne deziri, ke dum momento ŝi farigu sama, kiel ŝi estis tiun vesperon.

Helga tuj komencis paroli pri Hildur. Ŝi multe laŭdis ŝin, dirante, ke ŝi estas la plej bela kaj la plej saĝa junulino de la najbaraĵo kaj ŝi gratulis Gudmund pro tia bonega edzino. "Vi diru al ŝi, ke ŝi permesu min resti en Närlunda," ŝi diris. "Mi estos feliĉa servi al tia mastrino."

Gudmund ridetis pro ŝia fervoro, sed donis al ŝi nur unusilabajn respondojn, kiel se li ne aŭskultus tre atente. Sed estis ja bone, ke ŝi tiel ŝatis Hildur kaj tiel ĝojis pro tio, ke li intencas edziĝi.

"Ŝajnas, ke vi fartis bone ĉe ni ĉi tiun vintron?" li diris. — "Prava vi estas. Mi ne povas diri, kiel bonaj estis al mi sinjorino Ingeborg kaj vi ĉiuj." — "Ĉu vi iam deziris reiri al la arbaro?" — "Ho jes, komence, sed ne nun." — "Mi kredis ĝis

nun, ke kiu apartenas al la arbaro ne povas ne deziri reiri tien.”

Helga turnis la kapon flanken kaj rigardis sian kunulon, kiu iris sur la alia rando de la vojo. Gudmund jam fariĝis al ŝi tute fremda, sed nun ekestis io en la tonnuanco kaj en la rideto, kiun ŝi rekonis. Jes, li certe estas tiu sama, kiu alvenis kaj helpis ŝin en ŝia plej granda mizero. Kvankam li estis edziĝonta kun iu alia, ŝi estis certa, ke li volas esti al ŝi bona amiko kaj fidela helponto.

Ŝi fariĝis tiel ĝoja, sentante, ke ŝi povas fidi lin kiel nenium alian, kaj ŝajnis al ŝi, ke ŝi devas rakonti al li ĉion, kio jam okazis al ŝi post ilia antaŭa interparolo. ”Mi povas certigi al vi, ke la unuajn semajnojn estis al mi sufiĉe malfacile resti en Nârlunda,” ŝi komencis. ”Sed vi ne rakontu tion al sinjorino Ingeborg!” — ”Se vi volas, ke mi silentu, mi silentos.” — ”Imagu, ke komence mi sopiris tiel terure! Ne mankis multe, ke mi estus reirinta al la arbaro.” — ”Ĉu vi sopiris? Mi kredis, ke vi ĝojas esti ĉe ni.” — ”Tio tute ne estis mia kulpo,” ŝi diris senkulpigante. ”Mi bone komprenis, kiel utile estas al mi servi tie. Vi estis ĉiuj tiel afablaj al mi, kaj la laboro tute ne superis miajn fortojn, sed spite de tio mi sopiris. Ŝajnis ke io volis rekonduki min al la arbaro, suĉante kaj trenante. Ŝajnis al mi ke, volante restadi en la vilaĝo mi perfide trompis iun, kiu havas rajton pri mi.” — ”Eble estis —,” komencis Gudmund, sed li haltis meze de la frazo. — ”Ne, mi tute ne sopiris pri la knabeto. Mi ja scias, ke li fartas bone, kaj ke mia patrino estas afabla al li. Estis nenio difinebla. Estis, kiel se mi estus sovaĝa birdo, kiun oni metis en kaĝon, kaj mi kredis, ke mi mortos, se oni min ne ellasas.”

”Nu, vi certe suferis terure!” diris Gudmund, kaj samtempe

li ridetis, ĉar nun li jam pensis, ke li rekonas ŝin. Estis nun, kiel se nenio okazis, kiel se nur la lastan vesperon ili disiĝis ĉe la farmeto. Helga ridetis denove, sed daŭrigis la rakontadon de siaj suferoj. "Neniun nokton mi dormis," ŝi diris, "sed tuj post kiam mi estis enlitiĝinta, larmoj komencis flui, kaj kiam mi leviĝis en la mateno, la kapkuseno estis tute malseka. Tage, kiam mi laboris kune kun la aliaj, mi povis reteni la ploron, sed tuj kiam mi estis sola, mi havis larmojn en la okuloj."

"Vi jam multe ploris en via vivo," diris Gudmund, sed dirante tion li tute ne aspektis kompatema. Ŝajnis al Helga, kiel se li ridetus la tutan tempon. — "Verŝajne vi neniam komprenos, kiel mi suferis," ŝi diris, parolante ĉiam pli fervore en sia klopodo, ke li komprenu ŝin. "Regis min sopiro, kiu forprenis min de mi mem. Eĉ ne momenton mi povis senti min feliĉa. Nenio estis bela, nenio plezurigis min, al neniu mi povis korligiĝi. Vi estis ĉiuj same fremdaj al mi kiel tiam, kiam unu-foje mi eniris la bienon."

"Sed," scivole diris Gudmund, "ĉu vi ne ĵus diris, ke vi volas resti ĉe ni?" — "Jes, mi certe diris tion." — "Do vi ne sopiras plu?" — "Ne, tio jam ĉesis. Mi jam liberiĝis de tio. Nur atendu, kaj vi aŭdos."

Post kiam ŝi diris tion, Gudmund transiris la vojon kaj daŭrigis iri apud ŝi. Li ridetis la tutan tempon. Li aspektis gaja aŭdi ŝin paroli, sed verŝajne li ne multe atentis, kion ŝi rakontas. Iom post iom Helga ekhavis la saman humoron. Ŝajnis al ŝi, ke ĉio fariĝas malpeza kaj hela. La vojo de la preĝejo estis longa kaj malfacile irebla, sed hodiaŭ ĝi ne lacigis. Io ŝajnis porti ĝin. Ŝi daŭrigis sian rakonton, ĉar ŝi jam komencis, sed la rakontado ne estis plu tiel grava al ŝi. Ŝi estus estinta same feliĉa, se ŝi povus iri apud li en silento.

”Kiam mi estis plej malfeliĉa,” ŝi diris, ”mi iun sabatvesperon petis sinjorinon Ingeborg, ke ŝi permesu al mi hejmeniri kaj resti hejme la tutan dimanĉon. Kaj suprenmarŝante tiun vesperon la deklivojn al Stormyr, mi certe opiniis, ke mi ne revenos plu al Närlunda. Sed hejme patro kaj patrino tiel ĝojis, ke min dungis tiel ŝatata bieno, ke mi ne povis eĉ menciigi, ke mi ne toleras resti ĉe vi. Tuj kiam mi atingis la arbaron jam forflugis ĉiu angoro kaj ĉiu aflikto. Ŝajnis al mi, ke ĉio estis nura imago. Kaj krom tio mia plano estis malfacile realigebla pro la infano. Mia patrino jam zorgis pri ĝi kaj konsideras ĝin kiel sia. Ĝi ne apartenis plu al mi. Kaj plej bone estis tiamaniere, sed estis malfacile kutimiĝi al tio.”

”Eble vi jam komencis sopiri al ni ĉi tie malsupre?” demandis Gudmund. — ”Certe ne! Vekiĝinte lunde matene kaj pripensante, ke nun mi devas iri, mi denove bedaŭris la forveturon. Mi ĉiam ploris kaj maltrankviliĝis, ĉar la sole justa kaj ĝusta sendube estis, ke mi restu ĉe vi, sed mi sentis, ke mi malsaniĝos aŭ freneziĝos, se mi reiros. Sed tiam mi subite memoris, ke iam mi aŭdis iun diri, ke se oni forprenas iom da cindro de sia hejma forno kaj ĝin poste surŝutas sur la fornon de la fremda domo, oni povos liberigi sin de sia hejmsopiro.” — ”Jen rimedo facile uzebla,” diris Gudmund. — ”Jes, sed ĝi ankaŭ efikas tiel, ke poste plaĉas al vi neniu alia loko. Se oni forloĝiĝus de la bieno, kien oni jam portis la cindron, tiam oni sopirus al ĝi same forte, kiel antaŭe oni deziris forlasi ĝin.” — ”Ĉu oni ne povus kunporti iom da cindro kien ajn oni transloĝiĝas?” — ”Ne, ĝi efikas nur unu fojon. Poste ĉiu rimedo estas senutila. Estis do danĝere uzi tian rimedon.”

”Mi ne riskus ion tian,” diris Gudmund, kaj ŝi certe aŭdis, ke li nur mokas ŝin. — ”Sed mi riskis ĝin malgraŭ ĉio,” diris

Helga. "Estis pli bone ol aperi kiel nedankulo antaŭ sinjorino Ingeborg kaj vi, kiuj ja bonvolis helpi min. Mi kunportis iom da hejma cindro, kaj reveninte al Närlunda mi uzis momenton, kiam neniu ĉeestis, por surŝuti ĝin sur la fajroplaton."

"Kaj vi nun kredas, ke ĝuste la cindro helpis vin?" — "Atendu, kaj vi aŭdos, kio okazis! Min tuj okupis la oficoj, kaj la tutan tagon mi ne pensis pri la cindro. Mi sopiris tute same kiel antaŭe, tediĝante pro ĉio same kiel antaŭe. Estis multe da laboro farota tiun tagon, kaj interne kaj ekstere, kaj fininte vespere mian laboron en la stalo mi rimarkis, enirante, ke la fajro jam brulas en la forno."

"Nun mi vere scivolas aŭdi pri tio, kio okazis," diris Gudmund. — "Nu, imagu, eĉ trapasante la korton, mi opiniis, ke estas io familiara en la fajrobrilo, kaj malfermante la pordon, ŝajnis al mi, kiel se mi eniras nian propran dometon kaj mi trovos paĉjon kaj panjon sidantaj apud la forno. Nu, tio ja nur preterpasis min kiel en sonĝo, sed enirinte, mi miris, ke estas tiel belete kaj hejme en la ĉambro. Ŝajnis al mi, ke neniam antaŭe sinjorino Ingeborg kaj vi aliaj aspektis tiel afablaj kiel tiun vesperon en la fajrobrilo. Mi spertis veran ĝuon eniri, kaj tion mi ne spertis antaŭe. Mi tiel miris, ke mi estis tute preta kribi kaj klakfrapi la manojn. Ŝajnis al mi, ke vi jam tute ŝanĝiĝis. Vi ne estis plu fremdaj al mi, sed mi povis preparoli kun vi ĉion ajn. Vi certe komprenas, ke mi ĝojis, sed mi ne povis ne miri. Mi demandis min, ĉu mi estas ensorĉita. Kaj sammomente mi memoris pri la cindro, kiun mi disŝutis sur la fajroplaton." —

"Jes, tio ja estis stranga," diris Gudmund. Li tute ne kredis je superstiĉo aŭ sorĉaĵo, sed neniel malplaĉis al li aŭdi Helgan

priparoli tion. "Nun la petolema arbara knabino revenis," li pensis. "Ĉu iu povas kompreni, ke tiu, kiu jam travivis tiom, spite de tio povas esti tiel infana?"

"Jes, tio certe estis stranga," diris Helga. "Kaj la sama afero ripetiĝis la tutan vintron. Tuj kiam la fajro brulis sur la fajroplato, mi sentis la saman sekurecon kaj komforton ĉe vi kiel hejme. Sed fajro sendube ja ankaŭ estas io stranga. Mi ne pensas pri kiu ajn fajro, sed nur pri tiu, kiu brulas en forno kaj la tutan loĝantaron de la domo kunigas vesperon post vespero. Ĝi fariĝas preskaŭ malnova konatulo. Ĝi ludas kaj dancas kaj kraketadas al ni, kaj kelkfoje ĝi estas malseka kaj malbonhumora. Estas kiel se al ĝi estus eble, doni komforton aŭ malkomforton. Nun mi opiniis, ke la hejma fajro translokiĝis al mi, kaj ke ĝi donis al ĉio tie la saman brilon de komforto kiel hejme."

"Sed se vi devos forlasi Närlundan?" diris Gudmund. — "Tiam mi devos sopiri al ĝi dumvive," ŝi diris, kaj ŝia voĉtono klare montris, ke ŝi parolas tute serioze. — "Nu, mi neniam forpelos vin," diris Gudmund, kaj kvankam li ridis, estis io varma en lia voĉo.

Post tio ili ne komencis novan interparolon, sed iris silente ĝis la bieno. Gudmund kelkfoje turnis la kapon kaj rigardis la junulinon, kiu marŝis apud li. Ŝi jam kvietiĝis post la severa tempo, kiun ŝi travivis dum la pasinta jaro. Nun ŝi aspektis iom freŝa kaj rozkolora. La trajtoj estis etaj kaj delikataj, la hararo buklo ĉirkaŭis ŝian kapon, la okuloj estis nedifineblaj. Ŝi marŝis rapide kaj gracie. Kiam ŝi parolis, la vortoj sinsekvis rapide, sed samtempe timeme. Ŝi ĉiam timis, ke oni mokos ŝin, sed spite de tio ŝi ne povis kaŝi, kion ŝi sentas.

Gudmund demandis sin, ĉu li deziras, ke Hildur estu tia,

sed li certe tion ne volis. Tiu Helga ja estos edzece nenio dizirinda. —

Kelkajn semajnojn post tio Helga aŭdis, ke ŝi devos forlasi Närlundan en aprilo, ĉar Hildur Eriksdotter ne volos loĝi sub la sama tegmento kiel ŝi.

Tamen la gemastroj ne diris ĉi tion al Helga malkaŝe. Sinjorino Ingeborg komencis diri al ŝi, ke kiam alvenos la nova bofilino, ili sendube ricevos de ŝi tiom da helpo, ke ili ne bezonos havi tiom da servistoj. Alian fojon ŝi diris, ke ŝi aŭdis pri bona ofico, kie Helga estos pli feliĉa ol ĉe ili.

Ne estis necese al Helga aŭdi pli por kompreni, ke ŝi devos foriri, kaj ŝi tuj deklaris, ke ŝi intencas forloĝiĝi, sed ŝi deziras neniun alian oficon, ĉar ŝi reiros al sia hejmo.

Estis facile videble, ke ili libervole ne maldungis Helgan.

Kiam alvenis la tago de ŝia foriro, oni surtabligis tiom da manĝaĵoj, ke estis preskaŭ festeno, kaj sinjorino Ingeborg donacis al ŝi tiajn provizojn da vestaĵoj kaj ŝuoj, ke ŝi, kiu iam alvenis tien kun nenio alia ol kunligaĵo sub la brako, nun preskaŭ ne trovis lokon en kofrego por siaj havaĵoj.

”Mi neniam ricevos same bonan servistinon kiel vin,” diris sinjorino Ingeborg. ”Kaj nun ne koleru min pro tio, ke mi lasas vin forloĝiĝi. Vi certe komprenas, ke tio ne okazas pro mia volo. Mi ne forgesos pri vi. Tiel longe, ke mi havos iom da potenco, vi ne suferos mizeron.”

Ŝi interkonsentis kun Helga, ke ŝi, Helga, teksu al ŝi litotukojn kaj mantukojn. Ŝi donis al ŝi laborotaĵon por almenaŭ duona jaro.

La tagon, kiam Helga forloĝiĝis, Gudmund staris en la brullignejo kaj fendis lignon. Li ne eliris por adiaŭi, kvankam la ĉevalo jam staris antaŭ la pordo. Ŝajnis, ke li laboras tiel

urĝe, ke li ne rimarkas, kio okazas. Ŝi do devis eniri al li por adiaŭi.

Li formetis la hakilon, premis la manon de Helga kaj diris iom rapide: "Dankon pro tiu tempo!" kaj li jam rekomencis la hakadon. Helga estus prefere dirinta ion pri tio, ke ŝi komprenas, ke estos al ili neeble zorgi pri ŝi, kaj ke ĉio estas ŝia propra kulpo. Ŝi mem ja aranĝis la aferon. Sed Gudmund hakis tiel fervore, ke ligneroj ĉirkaŭflugis lin, kaj ŝi ne trovis okazon diri ion.

Sed plej mirinde ĉe la tuta forloĝiĝo estis, ke la mastro mem, la maljuna Erland Erlandson, veturigis Helgan al Stormyr.

La patro de Gudmund estis malalta, malgrasa viro kun senhara verto kaj belaj, saĝaj okuloj. Li estis tre apartema kaj tiel neparolema, ke kelkfoje la tutan tagon li ne diris eĉ vorton. Tiel longe ke ĉio okazis laŭorde, oni lin preskaŭ ne rimarkis, sed kiam io estis en malordo, li ĉiam alvenis kaj diris kaj faris ĝuste tion, kio estis dirota kaj farota por ĉion ordigi. Li estis speciale kapabla kiel kalkulisto kaj ĝuis grandan konfidon flanke de la viroj de la paroĥo. Li ricevis ĉiaspecajn komunumajn komisionojn, kaj oni lin ŝatis pli ol multajn grandajn bienulojn kun grandaj riĉaĵoj.

Erland Erlandson do hejmenveturigis Helgan kaj ne permesis al ŝi eliri en la deklivoj. Kiam ili alvenis al Stormyr, li longe sidis en la dometo, parolis kun la gepatroj de Helga kaj rakontis al ili, kiel kontentaj je ŝi estis ĉiam li kaj sinjorino Ingeborg. Nur sekve de tio, ke de nun ili ne bezonos tiom da servistoj, ili forsendis ĝin. Do ŝin kiel plej junan ili maldungis. Ŝajnas ja al ili nejuste maldungi iun el tiuj, kiuj jam servis ĉe ili de multaj jaroj.

La parolado de Erland Erlandson efikis laŭintence kaj la gepatroj bone ricevis Helgan. Aŭdante ke ŝi jam ricevis tiom da mendoj, ke ŝi povos nutri sin per teksado, ili kontentiĝis, ke ŝi restu hejme.

iv

Ŝajnis al Gudmund, ke ĝis la tago, kiam ŝi devigis lin al promeso, ke Helga forloĝiĝu el Nārlunda, li amis Hildur Eriksdotter. Ĝis tiam almenaŭ ekzistis neniu, kiun li admiris kaj ŝatis pli alte. Neniun junulinon oni povus, laŭ lia opinio, kompari kun Hildur, kaj li tre fieris, ke li sukcesis havigi ŝin. Estis ĉiam agrable por li pripensi la estontecon kune kun ŝi. Ili certe fariĝos riĉaj kaj ŝatataj, kaj li sciis, ke estos agrable vivi en hejmo, kiun Hildur mastrumas. Li ankaŭ kun plezuro pripensis la fakton, ke post kiam li edziĝos kun ŝi, li ricevos pli ol sufiĉe da mono. Li povos plibonigi la agrikulturon, rekonstrui ĉiujn kadukajn konstruaĵojn kaj plivastigi la bienon, tiel ke li fariĝos vere impona kamparano.

Ĝuste tiun dimanĉon, kiam li kuniris kun Helga de la preĝejo, li veturis vespere al Elvåkra. Tiam Hildur komencis paroli pri Helga, dirante, ke nur post la foriro de tiu junulino ŝi volas veni al Nārlunda. Gudmund unue klopodis bagateliĝi la tutan aferon kiel ŝercon, sed baldaŭ montriĝis, ke Hildur parolas serioze. Gudmund tre bone defendis Helgan, dirante ke ŝi ja estis tiel juna, kiam la unuan fojon oni igis ŝin akcepti oficon, ke tute ne estis mirinde, ke ŝi estis trompita, kiam ŝi renkontis tiel malbonan viron kiel Per Mårtensson. Sed de post kiam lia patrino zorgis pri ŝi, ŝi ĉiam kondutas bone. "Ne povas esti juste forpeli ĝin," li diris. "Tiam sendube okazos al ŝi denove ia malagrablaĵo."

Sed Hildur tute ne cedis. "Se tiu knabino restos en Närlunda, mi tien neniam venos," ŝi diris. "Mi ne toleros tian homon en mia hejmo." — "Vi ne scias, kion vi faras," diris Gudmund. "Neniu tiel kapablas zorgi pri panjo kiel ŝi. Ni ĉiam ĝojis, ke ŝi transloĝiĝis al ni. Antaŭe panjo multfoje senripoze riproĉis kaj estis malbonhumora." — "Nu, mi ne devigos vin forpeli ŝin," diris Hildur, sed vidiĝis, ke se Gudmund ne agos en tiu afero laŭ ŝia volo, ŝi estos ema nuligi la tutan geedziĝon. — "Nu, mi do agos laŭ via volo," diris Gudmund. Ŝajnis al li, ke li ne povas riski sian tutan estontecon pro Helga. Sed li estis tre pala, kiam li cedis, kaj li restis silenta kaj malgaja la tutan vesperon.

Estis tio, kio igis Gudmund timi, ke Hildur eble ne estas tute tia, kiel li kredis. Verŝajne ne plaĉis al li, ke ŝi trudis al li sian volon, sed plej ĉagrene estis, ke al li estis neeble kompreni ion alian ol tion, ke ŝi estas malprava. Li diris al si, ke li estus volonte cedinta al ŝi, se ŝi estus montrinta sin nobla, sed anstataŭe ŝajnis al li, ke ŝi estas nur pedanta kaj senkora.

Ĉiun fojon poste, kiam Gudmund renkontis Hildur, li nur serĉesploris kaj spionis por vidi, ĉu tio, kion li opiniis esti trovinta ĉe ŝi, denove montriĝos. Kiam lian suspektemon oni jam vekis, ne daŭris longe, antaŭ ol li trovis multon, kio ne estis tia, kia li deziris. "Sendube ŝi estas tia, ke ŝi pensas unue pri si mem," li ĉiun fojon murmuris, adiaŭante ŝin, kaj li sin demandis, kiom da tempo restus ŝia amo al li, se ŝi estus vere tentprovata. Li penis sin konsoli, pensante, ke ĉiuj homoj pensas antaŭ ĉio pri si mem, sed tiam li tuj memoris pri Helga. Li vidis ŝin, staranta en la juĝa kunsido, kaj li aŭdis ŝin ekkrii: "Mi nuligas la proceson. Mi lin amas ankoraŭ. Mi ne volas, ke li ĵuru trompe!" Estis ĝuste tiel, kiel li estus prefere

prezentinta al si Hildur. Helga jam fariĝis mezurilo, laŭ kiu li mezuris homojn. Verŝajne ne multaj homoj povus egali ŝin en amemo.

Tagon post tago Hildur malplaĉis al li pli kaj pli, sed li tute ne pensis, ke li resignos la geedziĝon. Li penis opinii, ke lia senkuraĝeco estas nenio alia ol sensencaj kapricoj. Nur antaŭ kelkaj semajnoj li konsideris ŝin kiel la plej preferinda junulino.

Se la afero okazus en la komenco de la fianĉiĝo, li eble sin fortirus. Sed nun oni jam oficiale anoncis la geedziĝon kaj difinis la tagon por ĝi, kaj en lia hejmo ili jam komencis ampleksajn rebonigojn. Li ankaŭ ne deziris perdi la riĉaĵojn kaj la bonan pozicion, kiuj atendis lin. Kaj kian kaŭzon preteksti por nuligi la geedziĝon? Tio, kion li riproĉis al Hildur, ja estis tiel malgrava, ke ĝi fariĝus aero inter liaj lipoj, se li provus tion eldiri.

Sed li ofte malĝojegis kaj ĉiun fojon, kiam oni lin sendis kun komisiono al la preĝeja vilaĝo aŭ al la urbo, li aĉetis iom da biero aŭ vino en la vendejoj, kiun li trinkis por bonhumoriĝi. Post kiam li malplenigis kelkajn botelojn, li denove fieris pro la geedziĝo kaj Hildur. Tiam li ne komprenis, kio lin turmentas.

Gudmund ofte pensis pri Helga, senpacience dezirante renkonti ŝin. Sed li opiniis, ke Helga lin konsideras mizerulon, ĉar li ne tenis la promeson, kiun li donis al ŝi tute libervole, sed konsentis al ŝia forloĝiĝo. Li povis nek doni klarigon nek senkulpiĝi, kaj tial li evitis renkonti ŝin.

Iun matenon irante laŭ la vojo, Gudmund renkontis Helgan, kiu vizitis la vilaĝon por aĉeti iom da lakto. Gudmund reiris kaj akompanis ŝin. Ŝi ne ŝajnis ĝoja pro la akompano,

ĉar ŝi iris rapide, kiel se ŝi volus liberigi sin de li, kaj diris nenion. Gudmund ankaŭ silentis, ĉar li tute ne sciis, kiel komenci interparolon. Ĉareto alproksimiĝis sur la vojo el distanco. Gudmund iris pensema, kaj li ĝin ne rimarkis, sed Helga ĝin jam vidis kaj nun subite turnis sin al li. "Ne povas esti, ke vi min akompanu, Gudmund, ĉar se mi ne erarvidas, estas la skabena familio de Elvåkra kiu proksimiĝas." Gudmund subite suprenrigardis, rekonis la ĉevalon kaj la ĉareton kaj faris movon kiel por reiri. Sed la postan momenton li rektiĝis kaj trankvile iris apud Helga, ĝis kiam la vojaĝantoj preterpasis. Tiam li malpliigis la rapidecon. Helga daŭre iris rapide kiel antaŭe, kaj ili disiĝis, kvankam li ankoraŭ ne diris eĉ vorton al ŝi. Sed tiun tutan tagon li estis pli kontenta je si mem ol de longe.

V

Estis decidite, ke la geedziĝon de Gudmund kaj Hildur oni solenu en Elvåkra la duan pentekostan tagon. La vendredon antaŭ Pentekosto Gudmund veturis al la urbo por aĉeti diversajn aĵojn por bonveniga festeno, kiun oni festos en Nārunda la tagon post la geedziĝo. En la urbo li okaze trafis kelkajn aliajn junulojn el sia paroĥo. Ili sciis, ke estas la lasta vojaĝo de Gudmund al la urbo antaŭ la geedziĝo, kaj tion ili pretekstis por aranĝi grandan trinkfestenon. Ĉiuj deziris, ke Gudmund trinku, kaj fine ili sukcesis eabriigi lin ĝis plena senhelpeco.

Li revenis hejmen sabaton matene tiel malfrue, ke lia patro kaj la servisto jam foriris al la laboro, kaj li dormis ĝis malfrue posttagmeze. Leviĝinte li rimarkis, kiam li surmetis la vestojn, ke la jako estis disŝirita en kelkaj lokoj. "Ŝajnas, ke mi partoprenis interbatalon la pasintan nokton," li diris, penante memori, kion li faris. Li ja memoris, ke li forlasis la gastejon ĉirkaŭ la deknua kune kun la kamaradoj, sed kien ili tiam iris, tion li ne povis memori. Ŝajnis al li kiel se li penus trarigardi vastan mallumon. Li ne sciis, ĉu ili nur ĉirkaŭmigris sur la stratoj aŭ ĉu ili eniris domon. Li ne memoris, ĉu li mem aŭ iu alia surmetis la jungaĵon sur la ĉevalon, kaj li nenion memoris pri la tuta hejmeniro.

Kiam li eniris la grandan ĉambron, ĝi estis lavita kaj purigita pro la festo. La laboron oni jam finis ĉie por la tago, kaj

la domanaro en tiu momento trinkis kafon. Neniu diris ion pri la vojaĝo de Gudmund. Ŝajnis, ke estis io memkomprenebla, ke li havos la rajton vivi laŭplaĉe ĉi tiujn lastajn semajnojn. Gudmund altabliĝis kaj ricevis sian kafon kiel la aliaj. Dum li verŝis ĝin el la taso sur la subtason kaj denove en la tason por ĝin malvarmetigi, sinjorino Ingeborg fintrinkis sian, malfaldis la gazeton, kiu ĵus alvenis, kaj komencis legi. Ŝi legis laŭtvoĉe kolonon post kolono kaj Gudmund, la patro kaj la aliaj aŭskultis.

Interalie ŝi laŭtlegis referaton pri interbatiĝo, kiu okazis la pasintan nokton sur la granda placo inter aro da ebriaj kamparanoj kaj kelkaj laboristoj. Tuj kiam alvenis policistoj, la batalantoj forkuris; nur unu el ili postrestis senviva sur la placo. Tiun oni portis en la policejon, kaj ĉar oni ne povis trovi sur li ian eksteran difekton, oni penis revivigi lin. Ĉiuj klopoĉoj tamen estis senefikaj, kaj fine oni trovis en lia verto postrestantan enpikitan klingon. Estis klingo de neordinare granda poŝtranĉilo, kiu penetris en la cerbon tra la kranio kaj rompiĝis tuj apud la kapo. La murdinto jam forkuris kun la tenilo, sed ĉar la policistoj bone konis tiujn, kiuj partoprenis la interbatiĝon, oni esperis lin baldaŭ trovi.

Dum sinjorino Ingeborg legis tion, Gudmund formetis la tason, ŝovis la manon en la poŝon, eltiris poŝtranĉilon kaj ĝin rigardis indifere. Sed subite li ekstremis, remetis la tranĉilon kaj ĝin poste enŝovis rapidege en la poŝon, kiel se ĝi estus lin bruliginta. Li ne trinkis plu el sia kafo sed sidis longe tute senmova kun pensema aspekto. La frunto havis profundajn sulkojn. Estis evidente, ke pense li penis prezenti ion al si.

Fine li leviĝis, etendis la membrojn, oscedis kaj iris malrap-

ide al la pordo. "Necesas tamen, ke mi havu iom da korpa ekzerco. Mi ne eliris la tutan tagon," li diris elirante.

Preskaŭ en la sama momento ankaŭ leviĝis Erland Erlandsson. Li finfumis sian pipon kaj eniris la malgrandan ĉambro por preni denove iom da tabako. Kiam li staris tie kaj plenigis la pipon, li vidis Gudmund foriranta. La fenestroj de la malgranda ĉambro ne donis vidon sur la korton kiel la granda ĉambro, sed sur malgrandan ĝardenon, kie kreskis kelkaj neordinare altaj pomarboj. Malantaŭ la ĝardeno troviĝis marĉo, kiu printempe preskaŭ subakviĝis kaj somere preskaŭ senakviĝis. Malofte oni iris laŭ tiu direkto. Erland Erlandsson sin demandis, kion Gudmund intencas fari kaj sekvis lin per la okuloj. Li tiam vidis, ke la filo enŝovis la manon en la poŝon, eltiris objekton kaj ĝin ĵetis for de si en la marĉon. Tiam li transiris la ĝardenon, suprensaltis plektobaron kaj malproksimiĝis laŭ la direkto de la vojo.

Tuj kiam li perdis el vido la filon, Erland Erlandsson eliris siavice kaj aliris la marĉon. Tie li iom envadis la ŝlimon kaj relative baldaŭ li kliniĝis por suprenlevi ion, kion li puŝis per la piedo. Estis granda poŝtranĉilo, al kiu la plej granda klingo estis rompita. Li ĝin turnis ĉiufanken kaj ĝin atente ekzamenis, dum li restis ankoraŭ en la akvo. Tiam li ĝin ŝovis en sian poŝon, sed li ĝin eltiris por ĝin denove ekzameni kelkaj fojoj, antaŭ ol li reeniris la domon.

Gudmund nur hejmenrevenis, kiam ĉiuj jam enlitiĝis. Li tuj enlitiĝis, sen tuŝi la vespermanĝon, kiu lin atendis en la granda ĉambro.

Erland Erlandsson kaj lia edzino dormis en la malgranda ĉambro. Je frua tagiĝo Erland kredis, ke li aŭdas paŝsonojn antaŭ la fenestro. Li ellitiĝis, flankenŝovis la kurtenon kaj vi-

dis, ke Gudmund foriris al la marĉo. Li demetis ŝtrumpojn kaj ŝuojn, envadis la akvon kaj iris tien kaj reen kiel persono, kiu serĉas ion. Li serĉis longe, tiam li suriris la bordon, kiel se li intencus foriri, sed baldaŭ reiris al sia serĉado. Dum tuta horo la patro rigardis lin. Tiam Gudmund eniris la domon por denove enlitiĝi.

La pentekostan dimanĉon Gudmund devis veturi al la preĝejo. Kiam li metis la jungaĵon sur la ĉevalon, la patro trapasis la korton. "Vi forgesis poluri la jungaĵon hodiaŭ," li diris preterpasante, ĉar kaj la jungaĵo kaj la ĉareto estis malpuraj kaj malpoluritaj. — "Mi tute ne havas tempon pripensi tiajn aferojn," diris Gudmund apatie kaj veturis, sen atenti pri la aspekto de la ĉareto.

Post la diservo Gudmund akompanis sian fianĉinon al Elvåkra, kie li restis la tutan tagon. Aro da gejunuloj kunvenis por soleni la lastan vesperon de Hildur kiel fraŭlino, kaj oni dancis ĝis malfrue nokte. Estis granda provizo da trinkaĵoj, sed Gudmund ne tuŝis ilin. La tutan vesperon li preskaŭ ne diris vorton al iu, sed li dancis furioze, kaj kelkfoje li ridegis laŭte kaj akrasone sen kaŭzo laŭ la opinio de la ĉeestantoj.

Gudmund hejmenrevenis nur ĉirkaŭ la dua, kaj tuj post kiam li enstaligis la ĉevalon, li foriris al la marĉo malantaŭ la domo. Li demetis siajn ŝtrumpojn kaj ŝuojn, suprentiris la pantalonon kaj envadis la akvon. Estis hela somera nokto kaj la patro, kiu staris en la malgranda ĉambro malantaŭ la kurteno, observis la filon. Li vidis, kiel li kliniĝas super la akvon kaj serĉas kiel en la pasinta nokto. De tempo al tempo li iris alborde, kiel se li malesperis trovi ion, sed post momento li denove envadis la akvon. Unufoje li foriris por preni sitelon el la stalo kaj komencis ĉerpi akvon el la malgrandaj akvejoj,

kiel se li intencus malplenigi ilin, sed verŝajne opiniis la aferon ne ebla kaj formetis la sitelon. Li ankaŭ provis kun retsaka fiŝkaptilo. Li traplugis per ĝi la tutan marĉon, sed ŝajne ellevis nenion ol ŝlimon. Li nur eniris je tiel malfrua horo, ke jam la loĝantaro de la domo komencis siajn oficojn. Tiam li estis tiel laca kaj dormema, ke li ŝanceliĝis, kiam li iris, kaj ĵetis sin sur la liton sen senvestigi sin.

Kiam sonis la oka, la patro lin vekis. Gudmund kuŝis sur la lito. La vestojn plenmakulis ŝlimo kaj argilo, sed la patro ne demandis, kion li faris; li nur diris, ke nun estas tempo ellitiĝi, kaj post tio li fermis la pordon. Post momento Gudmund mal-suprenvenis en la grandan ĉambron, vestita per la belaj edziĝaj vestoj. Li estis pala kaj la okuloj brilis malkviete, sed sendube neniuj antaŭe trovis lin tiel bela. La trajtoj preskaŭ reflektis internan brilon. Ŝajnis ke oni vidas personon ne plu konsistanta el karno kaj sango sed nur el volo kaj animo.

Estis solene en la granda ĉambro. La patrino jam vestis sin per sia nigra robo kaj jam pendigis beletan silkan ŝalon sur la ŝultrojn, kvankam ŝi ne iros al la geedziĝa soleno. Eĉ ĉiuj servistoj surhavis siajn plej belajn vestojn. Freŝan betulfoliaron oni surmetis sur la fornon. La tablo surhavis tukon kaj multe da manĝaĵoj.

Post kiam ili manĝis, sinjorino Ingeborg laŭtlegis psalmon kaj kelkaj linioj el la biblio. Tiam ŝi turnis sin al Gudmund kaj dankis lin pro tio, ke li ĉiam estis bona filo; kaj dezirante al li prosperon en lia estonta vivo, ŝi donis al li sian benon. Sinjorino Ingeborg sciis bone esprimi siajn pensojn kaj Gudmund tre kortuŝiĝis. Larmoj montriĝis multfoje en liaj okuloj, sed li spite sukcesis reteni la ploron. Ankaŭ la patro diris kelkaj vortoj. "Estos dolorige al viaj gepatroj perdi vin," li diris, kaj de-

nove Gudmund preskaŭ ekploris. Ĉiuj servistoj ankaŭ venis al li, skuis lian manon kaj dankis lin pro la tempo, kiu jam forpasis. Larmoj la tutan tempon staris en la okuloj de Gudmund. Li tusetis kaj kelkfoje penis paroli, sed li preskaŭ ne eldiris eĉ unu vorton.

La patro devis lin sekvi al la geedziĝfesta bieno kaj ĉeesti la geedziĝon. Li eliris por jungi la ĉevalon al la ĉareto kaj poste, kiam alvenis la tempo por la forveturo, li eniris kaj vokis Gudmund. Sidiĝante en la ĉareto, Gudmund rimarkis, ke ĝi estis purigita. Ĉio estis same brila kaj prizorgita kiel li mem ĉiam kutimis zorgi pri la ĉareto. Samtempe li ankaŭ vidis kiel purigita estas la korto. La enirvojon al la bieno oni ĵus sabligis, amasojn da malnova lignaĵo kaj aliajn malnovaĵojn, kiuj kuŝis tie dum lia tuta vivo, oni ĵus forigis. Ĉe ambaŭ flankoj de la enirpordo staris kelkaj dehakitaj betuloj kiel arko de honoro; granda krono de padusaj floroj pendis ĉe la ventoflago, kaj el ĉiuj fenestraj aperturoj elstaris helverda betulfoliaĵo. Mankis malmulte, ke Gudmund denove ploru. Li forte premis la manon al la patro, ĝuste kiam li intencis instigi la ĉevalon al forveturo. Estis kiel se li volus reteni la intencon de la patro. "Ĉu vi ion deziras?" diris la patro. — "Ho ne," diris Gudmund, "estis nenio. Plej bone estas foriri."

Gudmund bezonis ankoraŭfoje adiaŭi, antaŭ ol li malproksimiĝis tro de la bieno. Helga el Stormyr atendis ĉe la loko, kie la arbara vojeto el ŝia hejmo atingis la ĉefvojon. La patro veturigis kaj li haltis, vidante Helgan. "Mi vin atendas, ĉar mi volas deziri feliĉon al Gudmund hodiaŭ," diris Helga. Gudmund sin klinis de la ĉareto kaj premis ŝian manon. Ŝajnis al li, ke ŝi malgrasiĝis, la okuloj havis ruĝajn bordojn. Verŝajne ŝi ploris ĉiunokte kaj sopiris al Närlunda. Sed nun ŝi penis

aspekti bonhumora kaj afable ridetis al li. Li denove tre emociiĝis, sed povis diri nenion. La patro, kiu laŭfame nur parolis, kiam tio estis nepre necesa, tiam diris: "Mi kredas, ke ĉi tiu bondeziro ĝojigis Gudmundon pli ol io alia." — "Jes, prava vi estas," diris Gudmund. Ili ankoraŭfoje skuis al siajn manojn, kaj tiam la patro denove veturis. Gudmund kuŝis renversita dorsen kaj longe rigardis Helgan. Kiam ŝi malaperis malantaŭ kelkaj arboj, li subite malfermis la piedkovrilon kaj leviĝis kiel se li volus elsalti. — "Ĉu vi volas ankoraŭ diri ion al Helga?" demandis la patro. — "Ve, ho ne," respondis Gudmund kaj denove sidiĝis bonorde.

Ili veturis ankoraŭ pecon da vojo. La patro veturigis malrapide. Estis, kiel se plaĉus al li veturi tie kune kun la filo. Li tute ne klopodis veturi rapide antaŭen.

Subite Gudmund apogis la kapon al la ŝultro de la patro, ploreante. "Kio okazis?" Erland demandis kaj altiris la bridojn tiel forte, ke la ĉevalo haltis. — "Nu, ĉiuj estas tiel afablaj al mi, kaj tion mi ne meritas." "Vi tamen ne faris ion malbonan, ĉu ne?" — "Jes, paĉjo, mi faris." — "Tio ne povas esti vera." — "Jes, mi murdis homon."

La patro spiregis malfacile. Sonis kiel ĝemo de malŝarĝiĝo, kaj Gudmund mirigite levis la kapon kaj rigardis lin. La patro denove movigis la ĉevalon kaj tiam li diris trankvile: "Mi ĝojas, ke vi mem rakontis la aferon." — "Ĉu vi jam sciis, paĉjo?" — "Jam sabate vespere mi vidis, ke okazis io malbona. Kaj tiam mi trovis vian tranĉilon en la marĉo." — "Do, vi trovis la tranĉilon!" — "Mi ĝin trovis, kaj mi vidis, ke unu klingo estis derompita." —

"Jes, paĉjo, mi scias, ke la klingo forestas, sed spite de tio mi ne povas enkapigi la ideon, ke mi murdis." — "Tio sendu-

be okazis dum la ebrieco.” — ”Mi scias nenion, mi memoras nenion. Mi vidas laŭ la vestoj, ke mi partoprenis interbatigon, kaj mi scias, ke la klingo forestas.” — ”Mi komprenas, ke vi intencis silenti pri la afero,” diris la patro. — ”Mi opiniis, ke la aliaj kamaradoj estis eble same tutebriaj kiel mi kaj pro tio memoras nenion. Eble ekzistas neniu aliaj pruvoj ol la tranĉilo, kaj pro tio mi forĵetis ĝin.” — ”Mi komprenas, ke vi pensis tiel.” — ”Vi ja vidas, paĉjo: mi ne scias, kiu mortis; eble mi lin vidis neniam antaŭe. Mi ne memoras, ke mi murdis lin. Do mi opiniis, ke mi ne devas suferi pro io, kion mi faris nevole. Sed baldaŭ mi pensis, ke mi ja agis kiel malsaĝulo, kiam mi ĵetis la tranĉilon en la marĉon. Ĝi ja sekiĝas en la somero, kaj tiam iu ajn povos trovi ĝin. Kaj tiam mi penis trovi ĝin la pasintan nokton kaj ankaŭ la antaŭan nokton.” — ”Ĉu vi ne intencis konfesi?” — ”Ne, hieraŭ mi nur pensis, kiel mi povos sekretigi la aferon, kaj mi penis danci kaj esti gaja, por ke neniu rimarku ion ĉe mi.” — ”Ĉu vi do intencis edziĝi hodiaŭ, sen konfesi? Estis ago vere puninda. Ĉu vi ne komprenis, ke okaze de eltrovo, vi kuntiros Hildur kaj ŝian familion en vian mizeron?” — ”Mi opiniis, ke plej bone mi indulgas ilin, dirante nenion.”

Ili veturis antaŭen sur la vojo kun plej granda rapideco. La patro nun ŝajne deziregis alveni plejeble rapide. La tutan tempon li parolis kun la filo. Neniam antaŭe dum lia tuta vivo li diris al li tiom da vortoj.

”Mi min demandas, kial vi pensis aliamaniere,” li diris. — ”Estis pro la bondeziroj de Helga. Tiam io malmola rompiĝis en mi. Mi tiel emociiĝis pro ŝi. Mi ankaŭ emociiĝis pro panjo kaj vi hodiaŭ, kaj mi volis paroli por diri, ke mi ne indas vian amon, sed tiam la malmola en mi ankoraŭ postrestis kaj

kontraŭstaris. Sed kiam Helga alvenis, mi cedis. Mi ja opiniis, ke vere ŝi devas koleri al mi, ĉar estas ja mia kulpo, ke ŝi devis forloĝiĝi de ni.” —

”Nun mi opinias, ke vi konsentas kun mi pri tio, ke estas nia devo tuj sciigi tion al la skabeno,” diris la patro. ”Jes,” mallaŭte diris Gudmund, ”certe,” li aldonis poste pli laŭte kaj pli trankvile. ”Certe mi ne povas kuntiri Hildur en mian mizeron. Ŝi tion neniam pardonos al mi.” — ”La familio de Elvåkra zorgas pri sia reputacio same kiel aliaj,” diris la patro. ”Kaj nun mi diros al vi, Gudmund, ke hodiaŭ matene, kiam mi forveturis de mia bieno, mi pensis, ke estos mia devo rakonti al la skabeno vian aferon, se vi mem ne decidis fari tion. Neniam mi estus permesinta, ke Hildur edziniĝu al viro, kiun oni povus ĉiumomente akuzi pri homomurdo.”

Li klakis per la vipo kaj veturis ĉiam pli rapide. ”Tio estos plej peniga por vi,” li diris. ”Vi aranĝos la aferon tiamaniere, ke ĝi ne postulos multe da tempo. Mi kredas, ke la skabena familio opinios, ke vi agas korekte, denunciante vin mem; do ili verŝajne estos afablaj al vi.”

Gudmund ne respondis. Li aspektis ĉiam pli kompatinda ju pli ili proksimiĝis al Elvåkra. La patro daŭre parolis por lin kuraĝigi.

”Mi iam aŭdis ion similan,” li diris. ”Temis pri fianĉo, kiu okaze pafmortigis kamaradon dum ĉaso. Estis tute nevole, kaj oni ne trovis, ke ĝuste li faris la senintencan pafon. Sed kelkajn tagojn poste li devis edziĝi, kaj alveninte al la geedziĝa domo, li paŝis al la fianĉino kaj diris: ’Neeble estas geedziĝi. Mi ne volas kuntiri vin en la mizeron, kiu atendas min.’ Sed ŝi jam surhavis kronon kaj vualon, kaj nun ŝi prenis lin ĉe la mano kaj kondukis lin en la salonon, kie atendis la gastoj, kaj

ĉion oni jam pretigis por la geedziĝa beno. Ŝi laŭtvoĉe rakontis al ĉiuj, kion ĵus diris la fianĉo al ŝi. 'Tion mi nun rakontas, por ke ĉiuj sciu, ke vi ne mensogis al mi,' ŝi diris tuj poste, turnante sin al la fianĉo. 'Sed nun mi volas tuj edziniĝi al vi, ĉar vi estas la sama, kvankam vi spertis malfeliĉon, kaj kio ajn atendas vin, mi volas kunhelpi al vi porti ĝin.' —

Ĝuste kiam la patro finis la rakonton, ili atingis la vojon, kiu kondukis al Elvåkra. Gudmund turnis sin al li kun melankolia rideto. "Tiel ne okazos nun," li diris. — "Kiu scias?" diris la patro, rektiĝante en la ĉareto. Li rigardis la filon ankoraŭfoje, mirante kiel bela li aspektas tiun tagon. "Mi tute ne miros, se okazos al li io granda kaj neatendita," li pensis.

Estis decidite, ke la geedziĝo okazos en la preĝejo, kaj amaso da homoj jam kolektiĝis ĉe la bieno por veturi en procesio al la preĝejo. Multaj parencoj de la skabena familio, kiuj loĝis tre malproksime, ankaŭ alvenis. Ili sidis sur la ŝtupara supraĵo, pretaj por la forveturo, kaj ili surhavis festvestojn. Ĉaretojn kaj kaleŝojn oni jam eligis en la korton, kaj oni aŭdis la piedfrapadon de la ĉevaloj en la stalo, dum oni striglis ilin. La vilaĝa muzikisto sidis sola sur alia ŝtuparo, agordanta la violonon. En fenestro de la supera etaĝo staris la jam finvestita fianĉino kaj rigardis por vidi la fianĉon, antaŭ ol li vidos ŝin.

Erland kaj Gudmund elveturiĝis kaj tuj petis la permeson paroli aparte kun Hildur kaj ŝiaj gepatroj. Baldaŭ ili staris ĉiuj en ĉambreto, kie la skabeno havis sian skribotablon.

"Mi pensas, ke vi jam legis en la gazetoj pri la interbatiĝo en la urbo dum la antaŭsabata nokto, kiam homon oni murdis," diris Gudmund rapide. — "Jes, certe ni legis pri ĝi," diris la skabeno. — "La fakto estas, ke mi troviĝis en la urbo tiun nokton," daŭrigis Gudmund. Nun neniu respondo aŭdeblis.

Fariĝis silento de tombo. Ŝajnis al Gudmund, ke ĉiuj lin rigardas fikse kaj kun tioma teruro, ke li ne povis daŭrigi. Sed la patro helpis lin. — "Gudmund estis priregalita de kelkaj liaj amikoj. Li verŝajne drinkis tro tiun nokton, kaj kiam li venis hejmen, li ne sciis, kion li estis farinta. Sed facile estis vidi, ke li partoprenis interbatiĝon, ĉar la vestoj estis disŝiritaj." Gudmund vidis, ke la teruro, kiu regis la aliajn, pliiĝis ĉe ĉiu vorto, sed li mem ĉiam pli trankviliĝis. Naskiĝis ĉe li sento de obstino, kaj li denove parolis: "En la sabata vespero, kiam alvenis la gazeto kaj mi legis pri la interbatiĝo kaj pri la klingo, kiun oni enŝovis en la kranion, mi elpoŝigis mian tranĉilon, kaj tiam mi vidis, ke mankas al ĝi unu klingo." — "Vi alportas vere malbonajn novaĵojn, Gudmund," diris la skabeno. "Plej korekte estus, se vi estus tion rakontinta al mi hieraŭ." Gudmund silentis, sed nun la patro denove intervenis. — "Ne estis facile por Gudmund. Estis ja granda tento silenti pri ĉio. Li perdos multon pro ĉi tiu konfeso." — "Jes, ni devas ĝoji, ke li parolis nun, tiel ke nin li ne povas kuntiri en sian mizeron," maldolĉe diris la skabeno.

La tutan tempon Gudmund fikse rigardis Hildur. Ŝi surhavis kronon kaj vualon, kaj li vidis, kiel ŝi levis sian manon kaj eltiris unu el la grandaj pingloj, kiuj fiksas la kronon. Ŝi ŝajne tion faris nekonscie. Kiam ŝi rimarkis, ke Gudmund rigardas ĝin, ŝi reenŝovis la pinglon.

"Estas ja ankoraŭ ne pruvite, ke Gudmund estas la murdinto," diris la patro, "sed mi komprenas, ke vi preferus, ke la geedziĝon oni prokrastu, ĝis kiam ĉion oni estos esplorinta." — "Estas senutile, mi pensas, paroli pri prokrasto," diris la skabeno. "Mi pensas, ke Gudmund estas tiel certa pri siaj

agoj, ke ni povas interkonsenti pri tio, ke tuj ĉesu la ama interrilato inter li kaj Hildur.”

Gudmund ne tuj respondis al tiu apelacio. Li alproksimigis la fianĉinon, etendante la manon. Ŝi restis tute senmova kaj ŝajnigise, ke ŝi ne vidas lin. ”Ĉu vi ne volas diri adiaŭ al mi, Hildur?” Nun ŝi suprenrigardis, kaj ŝiaj grandaj okuloj brilis pro malestimo. ”Ĉu vi direktis la tranĉilon per tiu mano?” ŝi demandis. Gudmund ne respondis al ŝi, sed turnis sin al la skabeno. — ”Jes, nun mi estas certa pri la afero,” li diris. ”Estas senutile prokrasti la geedziĝon.”

Per tio ĉesis la interparolo kaj Gudmund kaj Erland foriris. Ili devis trairi multe da ĉambroj kaj vestibloj antaŭ ol ili eliris, kaj ĉie ili vidis la preparaĵojn por la geedziĝo. La pordo de la kuirejo estis malfermita, kaj ili vidis multegajn homojn, kiuj rapidis tien kaj reen. Elvenisodoro de rostaĵoj kaj bakaĵoj; la tutan fajroplaton plenkovris malgrandaj kaj grandaj bolpotoj, la kuprajn kaserolojn, kiuj ordinaro ornamis la murojn, oni jam dekroĉis kaj uzis nun. ”Imagu, ke ĝuste pro mia geedziĝo ili tiel laboras!” Gudmund pensis, preterpasante.

Trairante la domon, li havis ideeton de la tuta riĉeco de la manova farmbieno. Li vidis la manĝoĉambron, kie oni jam aranĝis grandajn tablojn kun longa vico da arĝentaj pokaloj kaj kruĉoj. Li preterpasis la provizejon de vestoj, kie la plankon kovris kestegoj kaj la murojn grandega provizo da vestoj. Pli poste, veninte al la korto, li vidis aron da novaj kaj malnovaj ĉaroj; bonegajn ĉevalojn oni kondukis el la stalo, kaj belegajn ĉarkovrilojn oni metis en la ĉarojn. Lian rigardon renkontis kelkaj kortoj, kiujn ĉirkaŭis bovejo, stalo, ŝafejo, grenejoj, tenejoj, garbejoj, kaj multe da aliaj konstruaĵoj. ”Ĉion ĉi mi estus havinta,” li pensis, sidiĝante en la ĉareton.

Maldolĉa pento subite posedis lin. Li estus prefere saltinta el la ĉareto por eniri kaj diri, ke ne estas vera tio, kion li ĵus diris. Li ja volis nur mokŝerci kaj timigi ilin. Estis ja vere malsaĝe konfesi. Kiom utilos lia konfeso? Certe neniu tiros profiton el tio. La mortinto ja estas senviva. Ne, el ĉi tiu konfeso nur rezultos, ke ankaŭ li eniĝos en malbonstaton.

Dum la lastaj semajnoj li ne tiel arde deziris tiun geedziĝon, sed nun, kiam estis necese rezigni pri ĝi, li vere vidis, kiom ĝi valoras. Estis multe perdi Hildur Eriksdotter kaj ĉion, kio kunsekvos. Ne gravis, ke ŝi estas obstina kaj memfidema. Ŝi ja estas la plej eminenta el ĉiuj en la najbaraĵo, kaj per ŝi li ja estus akirinta grandan influon kaj reputacion.

Li ĉagreniĝis ne nur pri Hildur kaj ŝiaj havaĵoj sed ankaŭ pri pli malgravaj aferoj. En tiu ĉi momento li ja estus forveturonta al la preĝejo, kaj ĉiuj, kiuj lin vidus, enivus lin. Kaj hodiaŭ li estus la plej ŝatata persono ĉe la geedziĝa manĝotablo. Ĝuste hodiaŭ li estus estinta meze de danco kaj ĝojo. La tago de lia feliĉo do foriris nun de li.

Erland sin turnis al la filo fojon post fojo kaj rigardis lin. Nun li ne aspektis tiel bela, kaj la okuloj ne brilis tiel klare kiel dum la mateno, sed li sidis apatie kaj senenergie kun senbrilaj okuloj. La patro sin demandis, ĉu la filo pentas sin, ke li konfesis, kaj unue li intencis demandi lin pri tio, sed poste li opiniis, ke plej bone estas silenti. —

”Kien veturi nun?” diris Gudmund post momento. ”Ĉu ne estas plej bone tuj veturi al la polica komisaro?” — ”Ĉu ne estas plej bone veturi hejmen, por ke vi povu ripozi kaj dormi,” diris la patro. ”Verŝajne vi ne dormis multe la lastajn noktojn.” — ”Panjo certe konsterniĝos, vidante nin.” — ”Ŝi kredeble ne tro miros,” diris la patro. ”Ŝi scias tiom, kiom mi.

Ŝi certe ĝojos, ke vi konfesis.” — ”Ŝajnas al mi, ke panjo kaj ĉiuj hejme ĝoje deziras, ke mi iru en malliberejon,” diris Gudmund amare. — ”Vi scias, ke vi perdas multon pro tio, ke vi agis korekte,” diris la patro. ”Ŝi ne povas ne ĝoji, ke vi venkis vin mem.”

Ŝajnis al Gudmund, ke estas tute neeble veturi hejmen por aŭskulti ĉiujn, kiuj lin laŭdos pro tio, ke li detruis sian estontecon. Li serĉis pretekston por ne devi renkonti iun ajn, antaŭ ol li trankviliĝis iom pli. Nun ili preterveturis la lokon, kie la vojeto devojigās al Stormyr. ”Ĉu vi bonvolas halti ĉi tie, paĉjo? Mi kredas, ke mi devas iri al Helga por paroli kun ŝi.” La patro volonte haltigis la ĉevalon. — ”Nur ne forgesu hejmenveni plej eble baldaŭ, por ke vi povu ripozi!” li diris.

Gudmund eniris la arbaron kaj baldaŭ la patro perdis lin el la vido. Li tute ne intencis trovi Helgan, li nur deziris esti sola, por ke li ne estu devigata kontroli sin. Li sentis en si sensencan koleron al ĉio, li piedbatis ŝtonojn, kiuj baris al li la vojon, kaj kelkfoje li haltis por disŝiri grandan branĉon nur pro tio, ke folio frapetis lian vizaĝon.

Li sekvis la vojon al Stormyr, sed li preterpasis la farmeton kaj supreniris la monton, kiu troviĝas malantaŭ ĝi. Tie baldaŭ fariĝis malfacile antaŭeniri. Li erarforiĝis de la vojo, kaj por atingi la plej altan supron, li devis transiri larĝan spacon da pintaj ŝtonegoj. Estis danĝera irado sur akraj supraĵoj de ŝtonegoj, kaj li estus rompinta al si brakojn kaj kruojn, se li estus erarpaŝinta. Li tion bone komprenis, sed li marŝis antaŭen, kiel se li havus plezuron meti sin en danĝeron. ”Se mi falos kaj pereos, neniuj povos trovi min ĉi supre,” li pensis. ”Sed tute egale. Same bone valoras morti ĉi tie kiel sidi dum jaroj en malliberejo.”

Tamen nenia malfeliĉo okazis, kaj post kelkaj minutoj li estis sur Storhöjden, la plej alta supro. Iam dezertigis la monton arbara brulego. La plej alta parto estis ankoraŭ senarba, kaj de tie oni ĝuis vidaĵon de tuta mejlo da ĉirkaŭo. Li vidis valojn kaj lagojn, malhelajn arbarojn kaj riĉajn kamparojn, preĝejojn kaj bienojn, malgrandajn farmetojn kaj grandajn vilaĝojn. Plej malproksime kuŝis la urbo, kovrita de blanka vualo de sunnebuleto, el kiu elstaris kelkaj brilantaj turoj. Vojoj serpentumante trairis la valojn, kaj vagonaro preterrapidis ĉe la arbarrando. Estis kiel se tuta regno estus antaŭ liaj okuloj.

Li ĵetis sin teren sed daŭre direktis la rigardon al la grandioza vido. La pejzaĝo antaŭ li enhavis ion fieran kaj grandiozan, kio igis lin senti sin mem kaj siajn ĉagrenojn malgrandaj kaj negativaj.

Li memoris, ke estante infano kaj legante, ke la tentisto kondukis Jesuon sur altan monton por montri al li la majestecon de la tuta mondo, li ĉiam kredis, ke ili staris ĉi supre sur Storhöjden, kaj li ripetis la malnovajn vortojn: "Ĉion ĉi mi donacos al vi, se vi surgenuiĝas por min adori."

Tiam subite ŝajnis al li, ke simila tento prezentis sin al li mem ĉi tiujn lastajn tagojn. Verŝajne la tentisto ja kondukis lin sur altan monton kaj montris al li la tutan ŝatindecon de potenco kaj riĉeco. "Nur silentu la malbonaĵon, kiun vi faris," li diris, "kaj mi donacos al vi ĉion ĉi." Kaj pensante pri tio, Gudmund spertis iom da kontento. "Mi ja respondis nee," li diris, kaj subite li komprenis, kio estus rezultinta el lia silento. Se li estus silentinta, ĉu tiam li ne devus adori la tentiston ĉiutage? Timema, senkuraĝa viro li fariĝus, nura sklavo sub

siaj havaĵoj. La timo pri eltrovo estus kuŝanta sur li por ĉiam. Neniam li sentus sin libera homo.

Granda trankvilo eniris Gudmundon. Li fariĝis feliĉa, ĉar li komprenis, ke li agis korekte. Pripensante la pasintajn tagojn li pensis, ke li iris blindpalpe en granda mallumo. Estis strange, ke fine li trovis la ĝustan vojon. Li demandis al si mem, kio okazis, por ke li ne devojiris. "Estis pro tio, ke hejme ili estas tiel bonaj kun mi," li pensis, "kaj plej bone helpis al mi, ke Helga alvenis por prezenti al mi siajn bondezirojn."

Li kuŝis ankoraŭ momenton supre sur la monto, sed baldaŭ li pensis, ke li devas iri hejmen al patro kaj patrino por diri al ili, ke li trankviliĝis. Kiam li leviĝis por foriri, li vidis, ke Helga sidas sur teraso iom malsupre.

Ŝi ne havis tiel grandan, vastan elrigardon de tie, kie ŝi sidis, nur malgranda peco de la valo estis al ŝi videbla. Närlunda troviĝis ĝuste en tiu direkto kaj verŝajne ŝi vidis parton de la bieno. Kiam Gudmund vidis ŝin, li sentis, ke lia koro, kiu laboris malfacile kaj timeme la tutan antaŭan parton de la tago, komencis bati ĝoje kaj vigle, kaj samtempe li spertis tian tremon de feliĉo, ke li haltis kaj miris pri si mem.

"Kio okazis? Kio okazis?" li pensis, dum la sango fluis torrente tra lia korpo, kaj la feliĉo lin tenis kun tia forto, ke preskaŭ doloris. Fine li diris al si mem kun mirigita voĉo: "Sed ja ŝin mi amas! Nur imagu, ke ĝis nun mi tion ne sciis!"

Tiu sento lin ekregis kun la forto de riverego, al kiu oni forigis ĉiujn barilojn. La tutan pasintan tempon, dum kiu li konis ŝin, li estis iel ligita. Ĉion, kio jam tiris lin al ŝi, li ĉiam retenis. Nur nun li povis forlasi la penson, ke li devos edziĝi al alia junulino; nun li rajtis ami ŝin.

"Helga!" li kriis, kaj samtempe li komencis malsuprengrim-

pi la krutaĵon por iri al ŝi. Ŝi turnis sin malantaŭen kun timigita krio. "Ne timu! Estas nur mi." — "Sed ĉu vi ne estas en la preĝejo por edziĝi?" — "Ho ne, okazos hodiaŭ neniuj edziĝoj. Hildur ne volas edziniĝi al mi."

Helga leviĝis. Ŝi metis la manon sur la koron kaj fermis la okulojn. Verŝajne ŝi pensis en tiu momento, ke alvenis vere ne Gudmund. Eble okazis, ke ŝi iluzias ĉi tie en la arbaro per la okuloj kaj oreloj. Sed estis dolĉe kaj kare, ke li alvenis, eĉ se estis nur vizio, kaj ferminte la okulojn, ŝi restis senmova por ĝui ankoraŭ dum kelkaj momentoj ĉi tiun vizion.

Gudmund estis preskaŭ ebria kaj deliranta pro la granda amo, kiu flamiĝis en li. Tuj kiam li atingis Helgan, li ĉirkaŭbrakis kaj kisis ŝin, kaj tion ŝi permesis, ĉar ŝi tute senkonsciiĝis pro surprizo. Estis ja tro strange kredi, ke li, kiu ĝuste nun devus stari en la preĝejo ĉe la flanko de sia fianĉino, alvenis fakte tien en la arbaron. Tiu antaŭulo aŭ duulo de li, kiu alvenis al ŝi, ja rajtis kisi ŝin.

Sed tuj kiam Gudmund kisis Helgan, ŝi vekigis, forpelante lin de si. Kaj tiam ŝi komencis superŝuti lin per demandoj. Ĉu estas fakte li mem? Kial li foriris en la arbaron? Ĉu ia malfeliĉo okazis? Ĉu Hildur estas malsana? Ĉu la pastron trafis atako de apopleksio?

Gudmund estus prefere priparolinta kun ŝi sian amon ol ion alian, sed ŝi devigis lin rakonti, kiamaniere ĉio okazis. Dum li parolis, ŝi sidis senmova kaj aŭskultis kun granda atento.

Ŝi ne interrompis lin antaŭ ol li parolis pri la rompita klingo. Tiam ŝi salte leviĝis kaj demandis, ĉu ĝi estas lia ordinara tranĉilo, tiu, kiun li havis, kiam ŝi servis ĉe ili. "Jes, ĝuste

tiu ĝi estis,” li diris. — ”Kiom da klingoj rompiĝis?” ŝi demandis. — ”Nur unu klingo forestas.”

Komencis labori en la kapo de Helga. Ŝi sidis kun sulkigita frunto kaj penis memori pri io. Kio okazis? Jes, ŝi klare memoris, ke tiun tranĉilon ŝi prunteprenis de li la tagon antaŭ ŝia forloĝiĝo por forhaki lignopecetojn. Tiam ŝi rompis la klingon, sed ŝi tute ne trovis okazon diri al li tion. Li ja tute evitis ŝin je tiu tempo kaj ne deziris paroli kun ŝi. Kaj post tiu tempo li verŝajne ne elpoŝigis la tranĉilon; do li ne rimarkis, ke la klingo forestis.

Ŝi levis la kapon kaj estis dironta al li tion ĉi, sed ĝuste tiam li rakontis pri sia vizito tiun matenon en la geedziĝifesta bieno, kaj ŝi volis lasi al li la tempon fini sian rakonton. Aŭdante kiel li kaj Hildur disiĝis, ŝi opiniis, ke tio estas tia malfeliĉo, ke ŝi riproĉe ekscitiĝis kontraŭ li. ”Estas via propra kulpo,” ŝi diris. ”Tie alvenis vi kaj via patro kaj timigis ŝin ĝismorte per la terura novaĵo. Tiel ŝi ne estus respondinta, se ŝi estus estinta si mem. Jen kion mi volas diri, nome, ke mi kredas, ke jam en ĉi tiu momento ŝi pentas la aferon.” — ”Ŝia pento estas al mi tute egala,” diris Gudmund. ”Mi nun scias, ke ŝi estas tia, ke ŝi pensas nur pri si mem. Mi ĝojas, ke mi liberigis min de ŝi.”

Helga kunpremis la lipojn, kiel se la granda sekreto ne eliru el ŝia buŝo. Multajn aferojn ŝi pripensis. Ne nur temis pri la senkulpiĝo de Gudmund rilate al la murdo. Ĉi tiu ja ankaŭ okazigis malamon inter Gudmund kaj la fianĉino. Ĉu ŝi, Helga, ne provu forigi ĉi tiun malamon per tio, kion ŝi scias pri la afero?

Denove ŝi sidis silente kaj pensis, ĝis kiam Gudmund rakontis, ke nun li jam turnis sian inklinon al ŝi. Tio ja ŝajnis al

ŝi la plej granda malfeliĉo, kiu trafis ŝin tiun tagon. Ja estas bedaŭrinde, ke li preskaŭ perdis la profitan geedziĝon, sed pli bedaŭrinde estos, se li amindumos tian kiel ŝi. "Ne, tion vi ne diru al mi," ŝi diris, salte leviĝante. — "Kial mi ne diru al vi tion?" diris Gudmund kaj paliĝis. "Ĉu ankaŭ vi timas min same kiel Hildur?" — "Ne, ne pro tio." Ŝi volis klarigi al li, ke sian propran ruinon li okazigus per siaj vortoj, sed li ne aŭskultis ŝin. — "Mi aŭdis iam, ke en la jam de longe pasinta tempo ekzistis virinoj, kiuj stariĝis ĉe la flanko de siaj viroj, kiam ili mizeriĝis, sed tiajn virinojn oni verŝajne ne renkontas hodiaŭ." Ekstremo trairis la korpon de Helga. Ŝi estus volonte ĉirkaŭbrakinta lian kolon, sed ŝi restis senmova. Hodiaŭ ŝi devas esti prudenta. — "Vere estas, ke ĝuste la tagon, kiam mi eniros la malliberejon, ne taŭgas peti vin edziniĝi al mi, sed se mi nur scius, ke vi volos atendi por edziniĝi al mi, kiam oni min ellasos, mi travivus bonhumore ĉion penigan." — "Ne estas mi, kiu atendas vin, Gudmund." — "Ĉiuj homoj konsideros min nun krimulo, drinkulo kaj murdinto. Sed se nur ekzistus iu, kiu volus rigardi min kun amo! Tio apogus min pli ol io alia." — "Mi certe scias, ke mi pensas pri vi, Gudmund, nenion ol bonon."

Helga restis sidanta senenergie. La petoj de Gudmund preskaŭ superregis ĝin. Ŝi tute ne sciis, kiel liberigi sin de li. Sed Gudmund komprenis nenion kaj pensis, ke li eraris. Verŝajne ŝi ne sentis por li la samon kiel li por ŝi. Li alpaŝis al ŝi kiel eble plej proksime kaj rigardis ŝin kiel se li volus trarigardi ŝin. "Ĉu vi ne sidas sur tiu ĉi rokrodo por vidi ĝis Nārlunda?" — "Jes, mi faras tion." — "Ĉu vi ne deziregas nokte kaj tage forloĝiĝi tien?" — "Jes, sed mi ne sopiras al iu ajn." — "Kaj min vi tute ne atentis, ĉu ne?" — "Jes, sed mi ne volas edziniĝi al

vi.” — ”Kiun vi do amas?” Helga silentis. ”Ĉu eble Per Mårtenson?” — ”Jes, mi ja diris iam, ke lin mi amas,” ŝi diris tute konsumigite.

Gudmund postrestis momenton, rigardante ŝin kun kole-rigita esprimo en la vizaĝo. ”Nu, adiaŭ do! Depost nun niaj vojoj disiĝas,” li diris. Kaj samtempe li faris grandan salton malsupren de la rokrando ĝis la proksima teraso de la monto, post kio li malaperis inter la arboj.

vi

Tuj kiam Gudmund malaperis, Helga rapidegis malsupren laŭ alia vojo. Sen halti ŝi kure preterpasis Stormyr kaj kuregis plejeble rapide malsupren de la deklivo al la grandvojo. En la unua bieno, kiun ŝi atingis, ŝi petis la permeson pruntepreni ĉevalon kaj ĉareton por veturi al Elvåkra. Ŝi diris, ke estas afero pri vivo, kaj ŝi promesis pagi por la helpo. Vizitantoj al la preĝejo jam reiris, rakontante pri la interrompita geedziĝo. Ĉiuj montris grandan emocion kaj kompaton, kaj oni ne volis rifuzi al Helga helpon. Ŝajnis, ke ŝi estas alportonta al la geedziĝa bieno gravegan novaĵon.

En Elvåkra Hildur Eriksdotter sidis en ĉambreto de la supra etaĝo, kie ŝi ornamis sin por la geedziĝo. Ŝin ĉirkaŭis la patrino kaj multaj aliaj vilaĝaninoj. Hildur ne ploris, sed ŝi estis neordinare silenta kaj tiel pala, ke ŝajnis, ke ŝi tuj malsaniĝos. La tutan tempon la virinoj parolis pri Gudmund. Ĉiuj mallaŭdis lin kaj ŝajnis opinii, ke estas feliĉo, ke Hildur liberigis sin de li. Iuj opiniis, ke Gudmund montris malmulte da konsidero al la bogepatroj, ĉar jam la pentekostan tagon li ne sciigis al ili, kio okazis. Aliaj diris, kiun atendas tia grava feliĉo, devas nepre peni pri bona konduto. Kaj iuj gratulis al Hildur, ĉar ŝi evitis edziniĝon al viro, kiu povas ebriiĝi tiagrade, ke li ne scias, kion li faras.

Meze de tio Hildur ŝajnis maltrankviliĝi kaj levis sin por eliri. Tuj kiam ŝi fermis post si la pordon, ŝia plej ŝatata ami-

kino, juna kamparanino, flustris al ŝi en orelon: "Sube estas persono, kiu volas paroli kun vi." — "Ĉu estas Gudmund?" demandis Hildur kaj montris ekbrilon en la okuloj. — "Ne, sed mi kredas, ke estas lia sendito. Ŝi volas transdoni la komision al neniu alia ol vi."

Nu, Hildur pensis la tutan tagon, ke nepre io okazos, kio finu ĉi tiun mizeron. Ŝi tute ne povis kompreni, ke tia terura malfeliĉo povas trafi ŝin. Ŝi opiniis, ke io nepre okazos, por ke ŝi povu denove surfiksi kronon kaj vualon, la geedziĝa procesio povu ekmarŝi al la preĝejo kaj la tuta geedziĝo denove komenciĝu. Kiam ŝi nun eksciis pri la sendito de Gudmund, ŝi vigliĝis kaj tuj kuris al Helga, kiu atendis ŝin en la kuireja vestiblo.

Hildur miris pri tio, ke Gudmund sendas al ŝi Helgan, sed ŝi pensis, ke dum la festotago li eble ne trovis alian transdanton, kaj ŝi salutis ŝin afable.

Ŝi faris al Helga signon, ke ŝi kuniru kun ŝi al la laktejo, kiu troviĝis trans la korto. "Mi scias pri neniu alia loko, kie ni povus resti solaj," ŝi diris. "Ankoraŭ la tuta domo estas plena de homoj."

Tuj post la eniro Helga alpaŝis apud Hildur kaj rigardis ŝin en la vizaĝon. "Antaŭ ol mi diras ion, mi nepre volas ekscii, ĉu vi amas Gudmundon." Hildur ekstremis pro indigno. Estis al ŝi dolorige interŝanĝi kun Helga eĉ solan vorton, kaj certe malmultan inklinon ŝi sentis fari ŝin sia intumulino. Sed estis nun nepre bezono kaj ŝi devigis sin al respondo: "Pro kio vi do kredas, ke mi volis edziniĝi al li?" — "Mi volas diri: ĉu vi lin amas ankoraŭ?" Hildur ŝtoniĝis, sed ŝi ne povis mensogi antaŭ la serĉesplora rigardo, kiun direktis al ŝi la alia. — "Eble neniam antaŭe mi lin amis tiel, kiel hodiaŭ," ŝi diris, sed tiel

mallaŭte, ke oni estus opinianta, ke estus dolorige al ŝi elparoli tiujn vortojn.

”Do tuj sekvu min!” diris Helga. ”Mi havas ĉareton sur la vojo. Nur eniru por surmeti iom da supervestoj, kaj ni tuj forveturos al Närlunda.” — ”Al kio utilos mia vojaĝo tien?” demandis Hildur. — ”Vi devas veturi tien por diri, ke spite de tio, kion ajn li faris, vi volas aparteni al Gudmund, kaj ke fidele vi atentos, dum li restas en malliberejo.” — ”Sed tio estas neebla. Mi volas neniel edziniĝi al viro, kiu estos en malliberejo.”

Helga iris malantaŭen, kiel se ŝi alpuŝegus muron. Sed ŝi rapide kuraĝiĝis. Ŝi komprenis, ke kiu estas tiel riĉa kaj potenca kiel Hildur ja devas pensi tiamaniere. ”Mi ne estus veninta kaj petinta vin veturi al Närlunda, se mi ne sciis, ke Gudmund estas senkulpa,” ŝi diris. Nun Hildur faris paŝon al Helga. — ”Ĉu vi tion scias aŭ ĉu temas pri nura konjekto?” — ”Plej bone estus tuj enveturiĝi, tiam mi povus rakonti dum la veturo.” — ”Ne, estas necese, ke antaŭe vi klarigu al mi vian agon. Mi nepre devas scii, kion mi faras.”

La fervoro de Helga estis tiel granda, ke ŝi preskaŭ ne povis resti senmova; tamen estis necese, ke ŝi rakontu al Hildur, kiamaniere ŝi sciis, ke Gudmund estas senkulpa. ”Ĉu vi tion ne tuj diris al Gudmund?” — ”Ne, nur nun mi tion diras al vi, Hildur. Neniu alia tion scias.” — ”Kaj kial vi alportis al mi tiun sciigon?” — ”Por ke ĉio repaciĝu inter vi. Certe li baldaŭ aŭdos, ke li faris nenion malbonan, sed mi volas, ke vi vizitu lin kvazaŭ propravole por rebonigi la aferon.” — ”Ĉu mi ne diru, ke mi scias, ke li estas senkulpa?” — ”Vi venu tute propravole, neniel aludante, ke mi parolis kun vi. Alie li neniam pardonos tion, kion vi diris al li hodiaŭ matene.”

Hildur aŭskultis silente. Estis io en ĉi tio, kion ŝi spertis neniam antaŭe, kaj ŝi klopodis klarigi al si la senton. "Ĉu vi scias, ke ĝuste mi insistis pri via forloĝiĝo el NÄrlunda?" — "Certe mi scias, ke la gemastroj de NÄrlunda deziris reteni min." — "Mi ne povas kompreni, ke hodiaŭ vi venas ĉi tien al mi por helpi min." — "Nu, bonvolu sekvi min nun, por ke ĉio reboniĝu!" Sed Hildur rigardis Helgan, ĉiam meditante. — "Eble vin amas Gudmund?" ŝi demandis. Sed nun estis elĉerpita la pacienco de Helga. — "Kion li akirus edziĝante al mi?" ŝi diris maldolĉe. "Vi ja scias, ke mi estas nenio alia ol malriĉa farmeta knabino, kaj dirante tion, mi ne diris pri mi la plej malŝatindan."

La du junulinoj elŝteliĝis nerimarkite el la bieno kaj baldaŭ ili sidis en la ĉareto. Helga veturigis kaj ŝi vere ne indulgis la ĉevalon, ĉar rapidege pasis la ĉareto. Ambaŭ silentis. Hildur rigardis Helgan. Ŝajnis, ke ŝi miris kaj pensis pri ŝi pli ol pri io ajn alia.

Kiam ili proksimiĝis al NÄrlunda, Helga fordonis la bridojn al Hildur. "Nun vi veturu sola ĝis la bieno por paroli kun Gudmund. Mi postsekvos post momento por rakonti, kion mi scias pri la tranĉilo. Sed vi ne aludu eĉ per unu vorto al Gudmund, ke mi venigis vin."

Gudmund sidis en la granda ĉambro de NÄrlunda apud sinjorino Ingeborg kaj parolis kun ŝi. La patro sidis malproksime de ili kaj fumis. Li aspektis kontenta, kvankam li diris nenion. Estis videble, ke li pensis, ke nun ĉio progresas laŭorde kaj ke li ne bezonas interveni.

"Mi estas scivola aŭdi, panjo, kion vi dirus, se mi farus Helgan via bofilino," diris Gudmund. Sinjorino Ingeborg levis la kapon kaj diris kun firma voĉo: "Mi akceptos kun plezuro

kiun ajn bofilinon, se mi scias, ke ŝi vin amas tiom, kiom devas ami edzino edzon.”

Tuj kiam ŝi diris tion, ili vidis Hildur Eriksdotter enveturantan en la korton. Baldaŭ poste ŝi eniris la ĉambron, kaj laŭ multaj aspektoj ŝi aspektis ŝanĝita. Ŝi ne proksimiĝis kun la ordinara vigleco, sed ŝajnis, ke ŝi estus prefere restinta ĉe la pordo kiel malriĉa almozulino.

Tamen ŝi alproksimiĝis kaj premis la manojn de sinjorino Ingeborg kaj de Erland. Poste ŝi turnis sin al Gudmund. ”Ĝuste kun vi mi volas iomete paroli.”

Gudmund leviĝis, kaj ili eniris la malgrandan ĉambron. Li forŝovis seĝon al Hildur, sed ŝi ne sidiĝis. Ŝi estis ruĝa pro embaraso kaj la vortoj eliris malrapide kaj timeme el ŝia buŝo. ”Mi bone scias ... Jes, sendube estis tro severa tio, kion mi diris al vi hodiaŭ matene.” — ”Nu, ni vin preskaŭ surprizis, Hildur,” diris Gudmund. Ŝi iĝis ankoraŭ pli ruĝa kaj hontema. — ”Mi ja estus devinta konduti pli prudente. Ni povus ... Eble ...” — ”Estas plej bone kio okazis, mi pensas. Senutile estas preparoli nun tion. Sed mi ĝojas pro via afableco.”

Ŝi kovris sian vizaĝon per manoj, enspiris tiel profunde, ke sonis kiel singulto, sed denove levis la kapon. ”Ne,” ŝi diris. ”Ne taŭgos agi tiel. Mi ne volas, ke vi kredu, ke mi estas pli bona ol mi estas. Iu venis al mi kaj diris, ke vi estas senkulpa kaj konsilis al mi rapidi ĉi tien por ĉion rebonigi. Kaj ke mi ne diru, ke mi jam scias, ke vi estas senkulpa, ĉar tiam vi ne opinios, ke estas stranga mia alveno. Nun mi diras al vi, ke mi mem dezirus, ke mi havus tiun ideon, sed ĝin mi ne havis. Sed mi sopiris al vi la tutan tagon kaj deziris, ke fariĝu ĉio kiel antaŭe. Kaj kia ajn estos la fino, mi volas diri, ke mi ĝojas, ke vi estas senkulpa.”

”Kiu donis al vi tiun konsilon?” demandis Gudmund. — ”Tion mi ne rajtas diri.” — ”Mi dubas, ke iu scias pri tio. Paĉjo ĵus alvenis de la juĝa persekutisto. Li sendis telegramon al la urbo. Kaj jen respondo, ke la veran murdiston oni jam trovis.”

Kiam Gudmund diris tion, Hildur sentis, ke la kruroj tremas sub ŝi, kaj ŝi sidiĝis rapide sur la seĝon. Ŝi ektimis pro tio, ke Gudmund estis tiel trankvila kaj afabla, kaj ŝi trovis, ke li estas tute sendependa de ŝia potenco. ”Mi komprenas, ke neniam vi forgesos, kiel mi kondukis hodiaŭ antaŭtagmeze.” — ”Ho jes, mi certe povas pardoni al vi tion,” li diris per la sama trankvila voĉtono. ”Tion ni ne priparolu plu!” —

Ŝi tremis, mallevis la okulojn kaj sidis kiel se ŝi atendis ion. ”Estis tre feliĉe, Hildur,” li diris, iris al ŝi kaj prenis ŝian manon, ”ke nia geedziĝo nuliĝis, ĉar hodiaŭ mi scias, ke mi amas iun alian. Mi kredas, ke mi amas ŝin jam de longe, sed nur hodiaŭ mi tion komprenis.” ”Kiun vi amas, Gudmund?” Hildur demandis indifere. — ”Estas senutile diri tion. Mi ja ne edziĝos al ŝi, ĉar ŝi ne amas min. Sed aliflanke mi ne povus edziĝi al iu alia.”

Ŝi levis la kapon. Estis malfacile diri, kio okupis ŝin. Sed en tiu momento ŝi sentis ke, kvankam filino de riĉa kamparano, kun sia tuta beleco kaj ĉiuj havaĵoj, ŝi estas nenio al Gudmund. Fiera ŝi estis kaj ŝi ne volis forlasi lin sen montri al li, ke apud ŝiaj eksterajoj ŝi havas per si mem iom da valoro. ”Mi volas, Gudmund, ke vi diru al mi, ĉu eble vi amas Helgan el Stormyr.” Gudmund daŭre silentis. ”Ĉar se vi arnas Helgan, mi scias, ke ŝi amas vin. Ŝi venis al mi kaj montris, kion mi devas fari, por ke ĉio estu bona inter ni. Ŝi sciis, ke vi estas senkulpa, sed ŝi ne diris tion al vi, sed unue sciigis min.” — Gudmund fikse rigardis ŝin en la okulojn. — ”Ĉu vi opinias,

ke tio montras, ke ŝin regas granda amo al mi?” — ”Pri tio vi povas esti certa, Gudmund. Tion mi povas atesti. Neniu en la mondo povas ami vin pli ol ŝi.”

Li transiris unu fojon rapide la plankon. Poste li haltis antaŭ Hildur. ”Sed vi, kial vi diras al mi tion?” — ”Mi ja ne volas malsuperi Helgan en nobleco.” — ”Ho, Hildur, Hildur!” li diris, metante la manojn sur ŝiajn ŝultrojn kaj skuante ŝin por esprimi sian emocion. ”Vi tute ne scias, ne, vi tute ne scias, kiom mi amas vin en ĉi tiu momento. Vi ne scias, kiel feliĉa vi faris min!”

*

Helga sidis ĉe la vojrandoj kaj atendis. Ŝi apogis la vangon per la mano kaj rigardis teren. Spirite ŝi vidis antaŭ si Gudmund kaj Hildur kaj pensis pri ilia feliĉo, kiu devas esti granda en ĉi tiu momento.

Dum ŝi sidis tie, servisto alvenis el NÄrlunda. Li haltis, vidante ŝin. ”Certe vi aŭdis, kion oni diras pri Gudmund?” — Jes, tion ŝi aŭdis.

”Estas ja feliĉe neniu vero. La vera murdisto jam estas en malliberejo.” — ”Mi ja scias, ke Gudmund ne povas esti murdisto,” Helga diris.

Tiam la viro ekiris, sed Helga restis ĉe la vojrandoj kiel antaŭe. Nu, ili do jam scias pri tio! Do ŝi ne bezonas iri al NÄrlunda por rakonti tion.

Ŝi sentis sin neordinare forlasita. Antaŭe dum la tago ŝi spertis tiom da fervoro. Ŝi tute ne pensis pri si mem, nur pri tio, ke la geedziĝo de Gudmund kaj Hildur realiĝu. Sed nun ŝi sentis, kiel forlasita ŝi estas. Kaj estas dolorige povi fari nenion por tiuj, kiujn ni amas. Nun Gudmund ŝin ne bezonas,

kaj ŝian propran infanon ŝia patrino faris sia. Ŝi apenaŭ permesas al ŝi mem rigardi ĝin.

Ŝi pensis, ke ŝi devas leviĝi kaj hejmeniri. Sed la deklivoj ŝajnis al ŝi longaj kaj penigaj. Ŝi ne sciis, kiel ilin supreniri.

Jen ĉareto alproksimiĝas el la najbaraĵo de Närlunda. Hildur kaj Gudmund sidis en la ĉareto. Nun ili sendube forveturos al Elvåkra por rakonti, ke paco fariĝis inter ili. Kaj morgaŭ okazos la geedziĝo.

Trovinte Helgan ili haltigis la ĉevalon. Gudmund fordonis la bridojn al Hildur kaj elsaltis. Hildur kapsalutis Helgan kaj forveturis.

Gudmund restis sur la vojo antaŭ Helga. "Mi ĝojas, ke vi sidas ĉi tie, Helga," li diris. "Mi pensis, ke eble estos necese iri ĝis Stormyr por trovi vin."

Tion li diris rapide, preskaŭ maldolĉe, kaj samtempe prenis ŝian manon per firma preno. Kaj ŝi vidis en liaj okuloj, ke nun li scias pri ŝi ĉion. Nun ŝi ne plu povos forkuri.

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-069-4